

JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2015–2016

1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. Esperanto-Aktiv'
- 1.4. Foiroj

2. Kapabligo

- 2.1. Kulturcentroj
- 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
- 2.3. Interretaj kursoj
- 2.4. KER-Ekzamenoj
- 2.5. "Bac blanc d'espéranto"
- 2.6. Afrika solidareco
- 2.7. Ĝemelaj urboj

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Preleg-turneoj

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro
- 4.3. Komitato kaj membraro
- 4.4. Financo

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Esperanto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta en Mandres-les-Roses la 27an de majo matene, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto: Aleks André, Susanna Beglaryan, Mireille Besset, Véronique Bichon, Katja Boen, Jean-Pierre Boulet, Pierre Bouvier, Jeanne-Marie Cash, Raymonde Coquisart, Michel Dechy, Josette Ducloyer, William Dumoulin, Pauline Gaborit, Didier Janot, Aleks Kadar, Roberto Kueny, Claude Labetaa, Edmond Ludwig, Flora Markov, Vinko Markov, Kévin Morel-Fourrier, Yves Nicolas, Claude Nourmont, Martine Ragonnet, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Bert Schumann, Pascal Vilain.

Apartan dankon al nia sekretario, Sylvain Barrier, kiu multe laboris por ĝi, kaj al niaj kasistoj, Anne-Emilie Ravache kaj Sébastien Montagne, kiuj baraktadis pri la financa raporto.

Agrablan legadon deziras al vi,

la estraro de Esperanto-France.

1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. Esperanto-Aktiv'
- 1.4. Foiroj

1.1. Gazetara Komunikado

La Gazetara Komunikado iom malkreskis kompare al la antaŭa jaro ĉar okazis la UK en Lille en 2015.

Pluraj gazetaraj komunikoj estis dissenditaj dum la jaro 2016.

Eventuale pli kompleta versio de la Gazetara Raporto estos prezentata dum la Membrokunveno fine de majo 2017 en Mandres-les-Roses. Vidu liston de artikoloj aperintaj en 2016 en landaj, regionaj kaj lokaj gazetoj en la retejo de Esperanto-France : <http://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2016>

Sociaj retoj: ekde januaro 2014, estas dissenditaj, preskaŭ ĉiutage, centoj da komuniketoj al la grupoj de Esperanto-France en:

[Google Plus](#)

[Vizaĝlibro](#) (Fejsbuko)

[Twitter](#)

La mesaĝoj temas pri aktualizaĵoj de la asocio en Parizo, en Francio, en la mondo, laŭ la ricevitaj informoj. Se vi deziras, ke ni dissendu mesaĝon al tiuj grupoj, bv. skribi al presse@esperanto-france.org.

Raportas Sylvain Barrier (helpe de Didier Loison)

1.2. Le Monde de l'Espéranto

Ĉefredaktoro: Claude Nourmont;

Grafika laboro: Bruno Flochon;

Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Sylvain Barrier, Bernard Behra, Anne Jausions, Didier Loison, Flo Martorell, Yves Nicolas, Laure Patas d'Illiers, Renée Triolle k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.

La esperantlingvajn tekstojn de la revuo relegas Brian Moon.

En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj. Aperis tri numeroj de septembro 2015 ĝis aŭgusto 2016; entute oni raportis pri okazaĵoj en dudeko da landoj de ĉiuj kontinentoj.

- numero 594: dosiero pri "Impressions sur Lille 2015";
- numero 595: dosiero pri la romanoj de la 21a jarcento en Esperanto;
- duobla numero 596-597: dosiero pri la universala kongreso en Nitro.

Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Espéranto-France: <http://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>.

Raportas Claude Nourmont

1.3. Esperanto-Aktiv'

La reta informletero Esperanto-Aktiv', verkita en la franca lingvo, aperas ĉiumonate. UFE kaj JEFO kune dissendas ĝin, de pli ol 5 jaroj, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

→ Pli ol 4000 personoj ricevas la leteron.

→ Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.

→ Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al: esperanto-aktiv@esperanto-france.org.

Kvar rubrikoj

- **Découvertes** (Malkovroj) prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj (ALeks Kadar, Raymonde Coquisart, Didier Janot, Sylvain Barrier) verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** (Okazis) listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Jeanne-Marie Cash.
→ Post ĉiu evento, vi bonvenas sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson kaj vian sperton.
- **Calendrier** (Okazos) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis François Bartsch kaj Sylvain Barrier.
→ Bonvolu anonci ĉiujn lokajn, naciajn aŭ tutmondajn eventojn.
- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** (Leginda, spektinda, aŭskultinda) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj (Anne Jausions, Bruno Flochon, Axel Rousseau, Sylvain Barrier) verkis en tiu rubriko.

Redaktora teamo

Sylvain Barrier (ĉefredaktoro), François Bartsch (redaktoro de rubriko "Calendrier"), Susanna Beglaryan, Jeanne-Marie Cash (redaktoro de rubriko "Ils l'ont fait..."; enpaĝigo de la pdf-versio), Raymonde Coquisart (preparo kaj dissendo de la papera versio), ALeks Kadar, Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau.

Listo de artikoloj

Monato	Numero	Malkovroj	Leginda, spektinda, aŭskultinda
09/16	EA 72	Pourquoi et comment créer un club	« La horoj subteraj », de Delphine de VIGAN

		d'espéranto ?	
07/16	EA 71	TEFA un jour à l'Euro de foot ?	« La Armeoj de Paluzie », de Manuel de SEABRA
06/16	EA 70	Jouer à Samopiniuloj	« La Knabo kaj la rivero », de Henri BOSCO
05/16	EA 69	Pasporta servo fête ses 50 ans.	« La Skandalo pro Jozefo », de Valdemar VINAŘ
04/16	EA 68	Espéranto-Bourg-en-Bresse à la radio.	Concours de poésie « Samideano »
03/16	EA 67	Cents bonnes raisons d'apprendre l'espéranto.	« Ho, tomboj de l'prapatroj », de Clelia CONTERNO GUGLIELMINETTI.
02/16	EA 66	Tournée des conférenciers - 1e partie : en France	« En Quête de sens », de Nathanaël COSTE et Marc de la MENARDIERE
01/16	EA 65	Les faits marquants de 2015 selon <i>La Ondo</i>	« Pulsas la viv' » de Lucija BORČIĆ
12/15	EA 64	La revue Espéranto-Info	« Jen nia viv-river' » de BaRok' Projekto
11/15	EA 63	BEMI	« Kajto Flugas » de Kajto
10/15	EA 62	Semaines sociales de France	« Emocioj » de Joëlle RABU et Veselin DAMJANOV

Raportas Sylvain Barrier

1.4. Foiroj

Ni ne partoprenis Expolangues, ĉar tiu foiro ne plu okazas kiel aparta lingvo-forumo. Ĝi estis absorbita de la Foiro pri Laboro.

Anstataŭe, ni partoprenis la Foiro pri Edukado (*Salon de l'éducation*) en Parizo (75) la 11-14an de marto. Jen la raporto prie aperinta en Esperanto-Aktiv' en marto 2016:

“Vendredi, samedi, dimanche et lundi nous avons tenu un stand au salon de l'Éducation à la Porte de Versailles. *Espéranto, la plus facile des langues* était le thème du stand. Nous avons eu plus de visiteurs et surtout plus jeunes et plus ouverts – surtout lycéens – qu'à Expolangues (salon désormais absorbé par le salon du travail). Le constat est que cette population est très ignorante de l'espéranto. Mais les jeunes sont ouverts à la nouveauté - et c'en est une pour eux ! Un très petit nombre avaient néanmoins déjà entendu parler de l'espéranto et étaient en général plus intéressés que la moyenne. Le choix de ce salon généraliste, visant surtout une population de jeunes, était donc un excellent choix. (Info : Didier Janot).”

<http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-67-okazis>

Krome, kiel tradicie, ni partoprenis la **Homaran Feston** en La Courneuve (93):

- la 11-13an de septembro 2015: ni havis tablon en la budo de la Normandia Federacio de la Komunista Partio;
- la 9-11an de septembro 2016: jen la raporto prie aperinta en Esperanto-Aktiv'.

“Contrairement aux 2 années précédentes, lors desquelles nous avons une table dans la tente du PC de Normandie, cette année nous avons eu un stand entier de 9 m² à l'intérieur de la Halle Léo-Ferré, dans le Salon du Livre. Stand tenu en commun avec des actifs de SAT-Amikaro.

Résultat : pas de pluie (malheureusement) donc moins de monde dans la Halle qu'à l'extérieur, mais plusieurs dizaines de contacts collectés, des calendriers distribués, des livres et divers matériels vendus. Si seulement il avait plu cette année ! (Info : A. Kadar).”

<http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-72-okazis>

2. Kapabligo

- 2.1. Kulturcentroj
 - 2.1.1. Greziljono - Kulturdomo de Esperanto (MCE Grésillon)
 - 2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)
- 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
- 2.3. Interretaj kursoj
- 2.4. KER-Ekzamenoj
- 2.5. "Bac Blanc d'esperanto"
- 2.6. Afrika solidareco
- 2.7. Ĝemelaj urboj

2.1. Kulturcentroj

2.1.1. Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France estas komitatano de la Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono ekde 2010 kaj ĝis 2018.
 Reprezentanto de EF: Didier Loison.
 Agadraporto por la jaro 2016.

Propraj staĝoj

Entute: 56 noktoj, 1519 tranoktoj, 4438 preparitaj manĝoj, por 254 homoj el kiuj 32 infanoj.

- *Printempas*: 08-16/04, 44 personoj;
- *Interkant'*: 20-24/04, 20 personoj;
- *Someraj staĝoj*: 4 semajnoj inter 12/06-28/08, entute 143 personoj;
- *Aŭtune kun Interkant'*: 23/10-02/11, 47 personoj;

Laboroj

Volontulaj laboroj okazis dum 31 tagoj.

- Pretigo de 6 (mal)novaj ĉambroj (nun estas 24 dormĉambroj kun 60 dormlokoj);
- Ĉefa laboro: renovigo de la okcidenta korniĉo kaj ardeza tegmento super la biblioteko.

Aliaj okazaĵoj

Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj bela etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongresojn aŭ staĝojn.

- Luado al ne-esperantistaj grupoj por financi laborojn: 25 luadoj dum entute 64 noktoj.
- Kreiĝo de la asocio Kampo de la Griloj: sukcesa organizo i.a. de staĝo pri perma(nent)kulturo.

Raportas Bert Schumann

2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

Agadraporto por la jaro 2016.

Staĝoj

- Februaro: lingva staĝo por komencantoj, gvidita de Ansofi Markov, sekvita de ekzamensio;
- Aprilo: staĝo pri altnivela tradukado, gvidita de Brian Moon (vicprezidanto de la Akademio);
- Junio: promenado tra naturo kaj Vikipedio, gvidita de Alain Favre (fungologo, botanikisto);

- Oktobro: elstara staĝo por prepari al “TAP/NAP”, gvidata de Katalin Kováts; la domoj plenplenis; pretiĝis por gustumigi Esperanton en elementaj lernejoj 17 entuziasmaj esperantistoj.

Kunordigado

Daŭre organizas la bibliotekon de la kulturcentro: Philippe Cousson.

Prizorgas la retpaĝojn de Kvinpetalo: Yannick Dumoulin.

Bonaj kontaktoj en la vilaĝo per: sistema informado ĉe la lokaj komercistoj (i.a. dank’ al la kalendarretoj); eta fako pri Esperanto en la mediateko (kun regula ricevo de *Le Monde de l’Espéranto*).

Kvinpetalo helpas konigi Bouresse tra la tuta mondo: la kulturcentro havis budon en la Movada Foiro en Nitro, kaj en diversaj okazoj oni mencias pri Kvinpetalo en esperantaj revuoj.

Raportas Claude Nourmont

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio.

Jarkunsido: dimanĉon la 2an de oktobro 2016 en la sidejo de SAT-Amikaro.

FEI-ekzamenoj

Trapasis 29 kandidatoj entute en Kvinpetalo, Nantes, Marsejlo kaj Lillo.

Sukcesis: la unuagradan: 21 homoj; la duagradan: 6 homoj.

La studentaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado (komuna parto de la triagrada ekzameno, trapasenda antaŭ la fakaj branĉoj), daŭre estas:

- La fotoalbumo de Trevor Steele
- Ĉu vi konas Blaise Cendrars? de Manuel de Seabra
- Kредu min, Sinjorino de Cezaro Rossetti
- Ne ekzistas verdaj steloj de Liven Dek

Ekzamen-sesio por la komuna trunko de la kapableco estas planita en Parizo la dimanĉon 15an de oktobro 2017.

Prov-ekzameno pri “Espéranto au bac”

Sesio okazis en junio 2016 en Chaumont (52) sub la respondeco de Espéranto-France.

Post trarigardo de la ekzamen-tasko estis interkonsentite, ke la venonta sesio povos okazi sub la ŝildo de FEI.

Por ke tiu ekzameno havu oficialan valoron en la franca ekzamen-sistemo necesos havi kvindekono da interesitaj kandidatoj. Vidu detalojn en la ĉi-suba komuniko.

Estraro

Mandatperiodo 2016-2019

Prezidanto: Vinko Markovo

Kasisto: Michel Dechy

Vic-sekretario: Didier Janot

Ekzamena komisiono: Renée Triolle (direktoro), Anne Jausions, Aleks André, Vinko Markovo.

Respondeculo pri la retejo: Pierre Dieumegard

Ceteraj membroj: Sylvain Barrier, Mirejo Grosjean, Christian Lavarenne, Ĵak Le Puil, François Lo Jacomo, Klaŭdo Roux.

Retejo

<http://franca-esperanto-instituto.net>

Por pliaj informoj, interalie datoj de venontaj ekzamensesioj kaj taskoj por memtrejniĝo.

Komuniko de FEI: « L'espéranto au bac ! » Recherche de lycées pilotes

Le 2 octobre 2016, les membres de l'Institut Français d'Espéranto (organisation commune d'Espéranto-France et SAT-amikaro) se sont réunis et ont évoqué les dernières avancées concernant l'ajout de l'espéranto comme langue facultative au baccalauréat.

Le 14 septembre 2016, Olivier NOBLECOURT, directeur adjoint de cabinet de Najat VALLAUD-BELKACEM, ministre de l'Éducation nationale, a accepté de recevoir Guy CAMY, Maurice JUY et François LO JACOMO pour connaître l'enseignement de l'espéranto dans les établissements scolaires. Assurant de transmettre le dossier à la DGESCO, il a déclaré : « L'Éducation nationale répond essentiellement aux demandes des familles et des enseignants et c'est à vous de solliciter cette demande en mettant en place vous-mêmes les enseignements pilotes que vous souhaitez. »

Des actions d'enseignements ont déjà lieu en primaire et secondaire, dans le cadre des activités périscolaires et des accompagnements personnalisés, et dans le supérieur dans le cadre du système de crédits ECTS. Certains chefs d'établissements ont déjà assuré à des enseignants espérantophones qu'ils étaient ouverts à la possibilité que leur établissement soit un « établissement pilote ». Il ne tient qu'à nous de faire connaître cette convergence actuelle, d'élèves intéressés, d'enseignants aptes à proposer des cours, de chefs d'établissements ouverts à la langue internationale, du ministère prêt à nous écouter.

La commission est formée par MM. CAMY, JUY et LO JACOMO. Si vous êtes enseignant de l'Éducation nationale prêt à former des élèves à l'espéranto, merci de contacter francois@lojacomio.eu, qui centralise les établissements où il est possible de proposer un nouvel examen blanc d'espéranto comme celui organisé le 4 juin dernier au lycée Charles-de-Gaulle de Chaumont (Haute-Marne). Avec au moins 50 élèves intéressés en France, nous serons en mesure de nous positionner au même titre que d'autres langues proposées comme option.

Raportas Vinko Markovo

2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la programo *Kurso de Esperanto*, la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

46 volontuloj korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2015 ĝis septembro 2016, 265 lernantoj aliĝis (342 en 2014-2013) kaj 59 finlernis la elektitan kurson (63 en 2014-2015).

Ingrid Malaquin mastrumas la kurson, Axel Rousseau kaj Emmanuelle zorgas la teknikajn problemojn. Dankon al Xavier Meunier, Christine Raiffaud, Paul Poulain kaj Sylvain Barrier, kiuj helpis por la renovigado de la interretaj kursoj.

De junio 2016, Emmanuelle kaj Axel multe plibonigis la interretajn kursojn:

- La tuta grafika fasado estis modernigita por ke lernantoj povu uzi ĝin per poŝtelefoniloj.
- Ili aldonis diversajn novajn ekzercojn kun filmoj, demandaroj (QCM), sonoj. Aliaj paĝoj estis aldonitaj por prezenti la esperantan kulturon (muziko ...)
- La ordo de lecionoj estas ŝanĝita por faciligi la lernadon de korelativoj (kiuj estis antaŭe instruitaj ĉiuj en la sama leciono).
- Nova ilo faciligas la memorigadon de vortoj per specifa tekniko de "plej taŭga frekvenca ripetado".
- Butiko estis aldonita por ke la lernantoj povu aĉeti diversajn varojn el la butiko de Esperanto-France
- Retmesaĝoj estas aŭtomate senditaj por memori al la lernantoj plu-lerni.
- Lernantoj estas instigitaj doni sian opinion fine de ĉiu leciono. Tio ebligas nin plibonigi la kursojn.

La rezultoj de tiuj plibonigadoj estas tre interesaj ĉar ni povas konstati, ke pli da lernantoj ol antaŭe povas finstudi la tutan kurson kaj ili finas ĝin pli rapide ol antaŭe.

Raportas Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau

2.4. KER-ekzamenoj

La 5a tutmonda ekzamensesio okazis la 16an de aprilo kaj 4an de junio 2016.

Okaze de tiu sesio 137 kandidatoj ekzameniĝis en 17 urboj de la mondo, inter ili 34 kandidatoj en 4 urboj de Francio:

- Baugé-en-Anjou: 14 kandidatoj
- Parizo: 8 kandidatoj

- Lannion: 7 kandidatoj
- Limoĝo: 5 kandidatoj

Por tiuj ekzamenoj, Espéranto-France subvenciiis 9 homojn :

- 1 junan junulon (< 20 jaroj)
- 6 junulojn (inter 20 kaj 30 jaroj)
- 2 homojn (> 30 jaroj)

Raportas Didier Janot

2.5. « Bac blanc d'Espéranto »

Laŭ la rekomendo de FEI rilate informon de mezlernejoj pri Esperanto kaj la projekto « Espéranto au bac », Esperanto-France iniciatis projekton « Bac blanc d'espéranto ». Tiu projekto celas proponi al mezlernejoj (ĉefe tiuj de klasoj 1^{re} kaj 2^{de}) provekzamenon abiturientan pri Esperanto kiu similas al ekzameno por lingvoj kiel nedeviga fako ĉe abituriento.

En 2016 por la unua jaro, la provekzameno « Bac blanc d'espéranto » okazis en unu liceo (Lycée Charles-de-Gaulle, en Chaumont, Haute-Marne). Tie la 4-an de junio 2016, el 9 aliĝintoj 7 mezlernejoj trapasis la provekzamenon. Inter ili tri brile sukcesis kun notoj inter 14 kaj 17/20. Tiun rezulton atingis Aleks André danke al unujara agado kadre de Esperanto-klubo kiun li starigis en la liceo kie li instruas matematikon.

La agado naskis intereson pri Esperanto-instruado en tiu ĉi liceo kaj aliaj lernejoj en Francujo: instruado de Esperanto kadre de « Accompagnement personnalisé » kaj en post-abiturientaj lernejoj kiel ENS.

Por esperi sukcesigi la projekton « Espéranto au bac » ĉe la ministerio pri edukado, ni devas varbi pli ol 50 kandidatojn jare por la provekzameno « Bac blanc d'espéranto »; la kabineto de la ministerio pri edukado jam montriĝis interesata pri la jara agado kaj proponis ke lernejoj sin prezentu kiel « lycées pilotes » por eventuale testi oficialan instruadon de Esperanto la venontajn jarojn. Do ek al la laboro: diskonigu la aferon!

Raportas Aleks André kaj Didier Janot

2.6. Afrika Solidareco

Laŭ la financa bilanco, neniu elspezo estis farita en 2015-2016.

Atingis la afrikan fonduson de Espéranto-France neniu peto respondanta al niaj nunaj kriterioj (libroj, lernolibroj kaj lernomaterialo).

Neniu aparta klopodo estis farita por koni la eventualajn bezonojn por helpi al Esperanto-lernado en Afriko.

→ Propono, ke estu enketo ĉe la diversaj landaj asocioj en Afriko kaj ankaŭ ĉe la Afrika Komisiono de UEA, por pli bone koni tiujn bezonojn kaj provizi la rezultojn al Esperanto-France, se eble dum la kongreso aŭ dum la komitato-kunsido de septembro 2017.

Jeanne-Marie Cash, komisiito pri la Afrika fonduso

2.7. Ĝemelaj urboj

La ĉefaj agadoj konsistis el:

- kontribuo al realigo de la 3-a fotoekspozicio pri ĝemelaj urboj dum le UK en Nitra kune kun Claude Nourmont;
- kontaktoj kun la nova estrarano de UEA respondeca pri ĝemelaj urboj, vicprezidanto Stefan MacGill pri kreado de eŭropa kaj aziaj komisionoj;
- oftaj kontaktoj kun la oficiala UEA komisiito Wu Guojiang;
- aperigo de alvoko pere de UFE-anoncoj pri la ebleco peti helpon de la komisiito de Espéranto-France por iniciati kontaktojn eksterlande: unu reago de urbo kiu peti helpon por klopodi trovi ĝemelan urbon pere de esperanto;
- kontaktoj kun UEA Kongresa sekretario kaj UEA delegito Wu cele kunlabori kun la LKK de Seulo por la 4-a fotoekspozicio. Daŭre atendata la respondo de la LKK.

Raportas Raymonde Coquisart, komisiito pri Ĝemelaj urboj

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Preleg-turneoj

3.1. Butiko

Plej bonaj vendoj dum la periodo 2015-2016. <http://esperanto-jeunes.org/arthur/requ%C3%AAte.php?id=550743>

<i>Eta Princo</i>	86	821,60
<i>Grand dictionnaire français-espéranto (kun suppl.)</i>	24	622,63
<i>La Templo de l' Suno</i>	49	568,76
<i>Metodo 11 (pour commencer)</i>	86	418,86
<i>Dictionnaire pratique (eld. 2014)</i>	26	407,20
<i>En quête de sens (DVD)</i>	19	376,00
<i>Dictionnaire de poche (E/F-F/E)</i>	85	356,25
<i>Cours rationnel d'espéranto (eld. 2006)</i>	37	354,00
<i>Ekspozicio en 12 paneloj</i>	1	290,00
<i>Faldfolio "Espéranto LA LANGUE EQUITABLE"</i>	4100	287,00
<i>Historio de la esperanta literaturo</i>	5	264,00
<i>Espéranto par la méthode directe</i>	35	252,49
<i>Grand dictionnaire Espéranto-français</i>	11	251,85
<i>Vojaĝo en Esperanto-lando (eld. 2005)</i>	13	246,51
<i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i>	21	243,00
<i>Budaj paneloj 2007</i>	2	240,00
<i>PIV (Plena Ilustrita Vortaro) (eld. 2005)</i>	4	237,00
<i>Metodo 12 (pour améliorer l'étude)</i>	39	209,70
<i>Lasu min paroli plu</i>	16	206,58

3.2. Sidejo

La Sidejo de Espéranto-France elkore dankas vin pro via atento kaj subteno dum la tuta jaro 2016.

Sekve de ricevo kaj traktado de nenombreblaj telefonalkvokoj, retmesaĝoj same kiel poŝtleteroj adresitaj al la sidejo ni:

- preparis kaj sendis pli ol 500 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj;
- notis pli ol 900 aliĝojn al Espéranto-France kaj abonojn al LME;
- notis pli ol 450 aliĝojn al UEA kaj al UK 2016;
- same kiel pli ol 200 abonojn al internaciaj revuoj;

Ni prizorgis ankaŭ specifajn agadojn kaj projektojn:

- kunorganizado de Nacia Kongreso 2016 (Marseille)
- daŭrigo de laboro por ordigi kaj ciferecigi nian arkivan trezoron: arkivo.esperanto-france.org (respondeculoj Régis Fournier kaj Jean Lazert);
- kunorganizado (Federacio IDF) kaj akcepto de pluraj konferencoj, kunvenoj, renkontiĝoj.

La sidejo estas malfermata lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo (post la 18a horo preskaŭ ĉiutage okazas kursoj).

Ĵaŭdo estas rezervata por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Kiel kutime pluraj eksterlandanoj vizitis la sidejon en 2016 (el Brazilio, Hispanio, Ĉinio, Svislando...).

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj en Parizon kaj tra Parizo, nia skipo (Liliane Bon, Maria Fessl, Jean-Louis Pouillet, Susanna Beglaryan) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

Raportas Susanna Beglaryan, kunordiganto de la sidejo

3.3. La landa kongreso

Ni elektis la belan urbon Marseille kiel nian kongreslokon por la jaro 2016. La kongreso okazis de la 5a ĝis la 8a de majo 2016, kun la temo « Marsejlo Pordo de Eŭromediterraneo ». Pli ol centoj da homoj el proksimaj kaj foraj partoj de Francio, kaj ankaŭ el eksterlando (5 landoj) partoprenis.

Tre resume: bunta kultura programo, atento al la lokaj specialaĵoj, multaj vizitoj en la urbo kaj proksimeco, la kutimaj statutaj kunvenoj kaj laborgrupoj, ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto, kaj interesa prelegaro.

La ĉefa kongresejo estis en pedagogia centro tuj apud la stacidomo Saint-Charles, vidalvide de la fama ŝtuparego. Eblis loĝi tre proksime de la kongresejo.

Tamen ne ĉio okazis en la ĉefa kongresejo, por ke la kongreso estu videbla en diversaj lokoj de la urbo.

La jara memborkunveno okazis tie, la 7an de majo 2016.

Nova kaj tre interesa afero, la filmo *En quête de sens* kun esperantaj subtitoloj estis projekciita. Ĝi estas partopreniga kaj civitana filmo de Nathanaël Coste kaj Marc de la Ménardière. « Serĉante signifon » rakontas la inican vojaĝon de du amikoj ekde infanaĝo, foririntaj por pridemandi la funkciadon de la mondo. La filmo estas en la franca kun esperantaj subtekstoj kaj disponebla ĉe la butikoj de Espéranto-France.

Raportas Bruno Flochon

3.4. Preleg-turneoj

Neniu turneo okazis de oktobro ĝis la fino de 2015.

En 2016 okazis kvar prelegvojaĝoj, nome:

- de la 14a de marto ĝis la 14a de majo: Saeed Ahmad, pakistanano, vizitis 13 klubojn. Kulturaj, religiaj temoj.
- de la 17a de majo ĝis la fino de junio: Abdurahman Junusov, dagestanano, vizitis 18 klubojn. Kulturaj kaj politikaj temoj.
- de la 19a ĝis la 30a de septembro: François Randin, svizo, vizitis 8 klubojn. Pedagogiaj temoj.

- de la 3a ĝis la 15a de septembro: Rainer Kurz, germano, vizitis 6 klubojn. Kulturaj kaj sociaktualaj temoj.

Proksimume 940 homoj ĉeestis la publikajn kunvenojn aŭ la renkontiĝojn en instruejoj kiujn organizis 30 kluboj en Francio kaj en Belgio. 200 homoj ne estis esperantistaj.

Aperis kelkaj artikoloj, okazis kelkaj radioelsendoj. La prelegantoj havis kontentigan nivelon kaj proponis allogajn temojn kiujn ĝuis la lokaj klubanoj kaj la “ĝenerala” publiko. Tiaj prelegoj, kun temporaba interpretado, probable altiras nur malgrandajn rondojn. Sed pli vasta reklamado kaj pli granda prokismeco kun la gazetaro eble plibonigus la rezultojn. Tro maloftaj sed plensukcesaj estis la aranĝoj en la instruejoj ĉar la publiko estis spontanea, atentema, scivolema kun temo ĝenerale antaŭpritraktita de la instruistoj.

La jenaj kluboj akceptis:

- 1 preleganton: (19 kluboj) Antverpeno, Ariège, Béziers, Clermont-Ferrand, Gap, Grenoble, Hérouville, Le Mans, Lille, Lyon, Montivilliers, Rennes, Saint-Nazaire, Strasbourg, Tarn, Thionville, Tuluzo, Vannes, Vendée.
- 2 prelegantojn: (10 kluboj) Angers, Bourges, Bruselo, Châteauroux, Dijon, Gironde, Limousin, La Ciotat, Périgueux, Saint-Brieuc.
- 3 prelegantojn : (1 klubo): Tours.

Raportas Yves Nicolas

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilato kun UEA
- 4.2. Komitato kaj membraro
- 4.3. Financo

4.1. Rilato kun UEA

Ĉefdelegito de UEA por Francio: Renée Triolle.

EF havas regulajn kontaktojn kun UEA. La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj.

Reprezentanto de EF ĉe la komitato de UEA: Claude Nourmont:

- Partoprenas en la komitataj kunsidojn de UEA dum la Universala Kongreso en Nitra;
- Partoprenas en la diskutlisto « komitato de UEA » (regule tra la jaro);
- Raportas al UEA pri okazaĵoj en EF;
- Reciproke informas la membrojn de EF pri gravaĵoj ĉe UEA.

Raportas Claude Nourmont

4.2. Komitato kaj membraro

Elektita en Parizo (maje 2015), la Komitato kunvenis kvar fojojn: majon 2015, oktobron 2015, januaron 2016, majon 2016.

Reprezentas la membrojn:

- Sylvain Barrier
- Pierre Bouvier
- Raymonde Coquisart
- Xavier Dewidehem
- Bruno Flochon
- Julia Hédoux
- Didier Janot

- ALeks Kadar
- Christian Lavarenne
- Didier Loison
- Claude Nourmont
- Armelle Piolat
- Anne-Émilie Ravache
- Emmanuelle Richard

Reprezentantoj de la membraj asocioj:

- Aŭvernio: Jean-Pierre Boulet
- Bretonio: Claude Bensimon
- Centrokcidento: (neniu)
- Langvedoko-Rusiljono: Martine Ragonnet
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: André Grossmann
- Parizo-Francilio: Michèle Abada-Simon
- Provenco: Pascal Vilain
- Rodanalpoj: Mireille Besset
- Sudo-Pireneoj: (neniu)
- JEFO (junuloj): Quentin Weber-Saban
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Marie-Thérèse Marin
- GEE (instruistoj/antoj): Jérôme Caré

Estraro (2015-2016):

- | | |
|-------------------------------------|-----------------------------|
| • Prezidanto: | ALeks Kadar |
| • Vicprezidanto (UK): | Xavier Dewidehem (nur 2015) |
| • Vicprezidanto (kongreso): | Bruno Flochon |
| • Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): | Didier Loison |
| • Ĝenerala sekretario: | Sylvain Barrier |
| • Vicsekretario: | Raymonde Coquisart |
| • Kasisto: | Anne-Émilie Ravache |
| • Vickasisto: | Julia Hédoux |

En Marsejlo en majo 2016 estis parte renovigita la komitato: ekŝiĝis Xavier Dewidehem, Julia Hédoux kaj Claude Nourmont; estis elektitaj Alexandre André, Pierre Bouvier, Jeanne-Marie Cash, William Dumoulin, Xavier Godivier, Didier Loison, Sébastien Montagne kaj Anne-Émilie Ravache. La nova estraro tuj poste elektita konsistas el:

- | | |
|--|-------------------------------------|
| <input type="checkbox"/> ALeks Kadar, | prezidanto; |
| <input type="checkbox"/> Bruno Flochon, | vicprezidanto pri landa kongreso; |
| <input type="checkbox"/> Didier Loison, | vicprezidanto pri eksteraj rilatoj; |
| <input type="checkbox"/> William Dumoulin, | vicprezidanto |

- ☐ Sylvain Barrier, ĝenerala sekretario;
- ☐ Anne-Emilie Ravache, kasisto;
- ☐ Sébastien Montagne, vickasisto.

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 617 membroj je la fino de la periodo 2015-2016 (30a de septembro 2016), kontraŭ 666 membroj je la fino de la periodo 2014-2015, kaj 644 membroj je la fino de 2013-2014. Verŝajne videblas kontraŭefekto de la UK en Lille. Vidu la suban tabelon / grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2009-2010.

Federacio	2015-2016	2014-2015	2013-2014	2012-2013	2011-2012	2010-2011
(sen federacio)	61	53	59	45	41	46
Aquitaine	54	66	73	35	34	31
Auvergne	11	16	14	17	12	16
Bourgogne-Franche-Comté	33	24	22	28	26	27
Bretagne	26	31	31	36	32	36
Centre-Ouest	47	49	46	50	50	53
France-Est	41	43	40	28	34	29
Paris-Île-de-France	140	144	129	116	121	140
Languedoc-Roussillon	24	31	36	33	22	29
Midi-Pyrénées	9	13	13	11	14	16
Nord	27	36	30	31	33	33
Normandie	22	22	21	21	22	23
Poitou-Charente	7	12	9	10	11	13
Provence	44	44	37	27	37	38
Rhône-Alpes	71	82	80	56	55	64
	617	666	640	544	544	594

Nun (je 25a de aprilo 2017), estas 43 membroj (86 en 2015-2016, 96 en 2014-2015), kiuj ne estis membroj antaŭe. Inverse, 178 membroj en 2014-2015 ne re-aliiĝis en 2015-2016. El la membroj 2015-2016, 220 estis membroj ankaŭ de UEA (340 en 2015-2016, 301 en 2013-2014). Estas 47 dumvivaj membroj. Forpasis 1 dumviva membro.

Averaĝa aĝo je la 25a de aprilo 2017 (je la 6a de aprilo 2016) de la:

Membroj	Vizitantoj de la persona spaco (en la retejo)	Komitatanoj	Estraranoj
66 (63)	54 (55)	57 (55)	41 (41)

4.3. Financo

Vd. la ĉikunan financon raporton.

5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

5.1. Akvitanio

Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Prezidanto: Ange Mateo

Retejo: <http://esperanto-gep.asso.fr/>

Informletero: Esperanto Périgord (kvaronjara) (<http://esperanto-gep.asso.fr/eo-informiloj.html>)

Kelkaj eventoj

15a de decembro, Bassillac: Zamenhof-tago

Aranĝo de kontaktoj per Skajpo kun tutmondaj esperantistoj;

Ĉeesto de lernejoj kaj de ĵurnalistoj; apero de du artikoloj en lokaj gazetoj.

Januaro: novaj retpaĝoj pri ludoj kaj eksterlernejaj agadoj.

Aprilo: alveno de Saeed Ahmad, el Panĝabujo (Pakistano), kadre de prelegturneo.

Junio: alveno de Abduraĥman Junusov, el Dagestano, kadre de prelegturneo.

23a-30a julio: partopreno en la UK de Nitra (Slovakujo).

De septembro 2016: Konkurs-ludo por junuloj

Demandaro (kvizo): vd. <http://esperanto-gep.asso.fr/eo-junuloj.html>;

Ĉ. 30 partoprenantoj (unuopaj kaj svisa mezlernejo, regule kontaktita per Skajpo);

Partopreno en la foiro pri bildstrioj de Bassillac (oktobro).

Kursoj

Lokoj: Périgueux, Saint-Cyprien, Saint-Germain-du-Salembre, Sarlat, Trélissac.

Por komencantoj kaj progresantoj.

Gvidantoj: Charles Carrey, Martine Demouy, Odette Jardin, Maurice Juy, Monique Juy, Claude Labetaa

Junuloj

Malkovro de Esperanto en bazlernejo dum eksterlernejaj agadoj ("TAP"):

2013-2014: En Bassillac: interveno po tri kunvenoj en ĉiu klasnivelo; en Périgueux: interveno po 12 kunvenoj en ĉiu klaso (foje pli ol 20 lernantoj) en pluraj lernejoj; kreado de retejo pri tiu laboro kun lernejoj de CM2: <http://esperanto-gep.asso.fr/eo-junuloj.html>.

2014-2015: Pluaj intervenoj en Périgueux; volontulaj grupoj en Bassillac.

2015-2016: Jara paŭzo.

Junulara fako: Ĵus kreita dank' al kelkaj infanoj de membroj de GEP; skajpaj interŝanĝoj inter junuloj.

Raportas Claude Labetaa.

5.2. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Estraro

Prezidanto: Jean-François Bouyge
Vicprezidanto: Samuel Gaillard
Vicprezidento: Daniel Lachassagne
Sekretario: Jean-Pierre Boulet
Kasisto: Rémi Deneu
Vickasisto: Carlos Rasteiro
Vickasisto: Gisèle Berger

Lokaj kluboj

Clermont-Ferrand; Cournon; Deux-Chaises; Montluçon; Moulins; Mozac.

Kursoj

Clermont-Ferrand: 3 komencantoj (kun François Dréno); 6 progresantoj (kun Rémi Deneu);
Cournon: 4 progresantoj (kun Jean-Pierre Boulet);
Deux-Chaises: 4 komencantoj (kun Christine Blanc);
Montluçon: 8 progresantoj (kun Daniel Lachassagne);
Moulins: 8 progresantoj (kun Gérard Tantôt);
Mozac: 1 komencanto (skajpe) kaj 6 progresantoj (kun Suzanne Emorine kaj Jean Couturier).

Kunvenoj

Clermont: pli ol 12 (inkl. "Kunvenoj en kafejo-legejo *Les Augustes*");
Deux-Chaises: 2 (anoj de Montluçon kaj Moulins);
Montluçon: 3 ĉiumonate;
Moulins: 4 ĉiumonate.

Agadoj

Akcepto de alilandanoj

Clermont-Ferrand: akcepto de franca-ĉina familio + vizito de la loka klubo;
Akcepto de François Randin el Lausanne (filmisto, vd. ĉerete per la ŝlosilvorto "dannirlsne")

Vojaĝoj

Daniel Lachassagne al Ĉilio kaj al Nitra (Slovakujo)

Partopreno en:

38a Ĝenerala membrokunveno de Unesko;
Mediterranea Esperanto-Semajno (Les Issambres, Francujo);
24a Semajno pri Kulturo kaj Turismo (Cambrils, Hispanujo);
Itala Esperanto-Kongreso (Frascati);
Liona Esperanto-Asocio, kongreso de Largentière.

Amaskomunikiloj

Anonco pri la "kunvenoj en kafejo-legejo" kaj grava artikolo rilate al Unesko en *La Montagne*
Montluçon: "La semaine de l'Allier" (01/09/16); "Espéranto Info" (09/10/16);

5.3. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

Por la jaro 2016

Loka grupoj

- Côtes-d'Armor: Armor-Espéranto (Saint-Brieuc, Peumerit-Quintin, Saint-Quay-Perros, Lannion, Saint-Michel-en-Grève, Trédez-Locquemeau, Guingamp, Pleudaniel, Dinan-Plélan-le-Petit-Ploubalay); Plouézec.
- Finistère: Quimper, Douarnenez, Landerneau.
- Ille-et-Vilaine: Rennes, Montfort, Saint-Malo.
- Morbihan: Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient, Pluvigner.
- Loire-Atlantique (kunlaboro kun la lokaj kluboj): Herbignac, Nantes, Saint-Nazaire, Saint-Aignan-de-Grand-Lieu.

Membraro

	Unuopulo aliĝinta al loka asocio	Geedzoj aliĝintaj al loka klubo	Unuopulo ekster Bretonio	Unuopulo en Bretonio	Lerneĵano, studento, senlaborulo
Aliĝkosto en 2016	8€	12€	12€	20€ (por inciti al la homoj aliĝi pere de loka klubo)	4€

	2016			2015	2014
Aliĝantoj	192 entute	180 pere de loka klubo	12 memstaraj	191	194
Uzantoj	ĉ. 2000	→ internaciaj renkontiĝoj en Pluezeko, staĝoj, kursoj, debatoj kaj prelegoj, informoj al lernejoj kaj universitatoj, deĵorado en kulturdomoj kaj foiroj, ktp.			

1. Federaciaj agadoj

Eldono de la federacia bulteno *Verda Triskelo* (2 foje jare); redaktoro: Jannick Huet.

Retejo: <http://bretonio.esperanto-france.org/>; administrantoj: Bert Schumann kaj Xavier Godivier.

Reta diskutlisto de la membroj: bretonio@yahooogroupes.fr; administras kvar volontuloj; aliĝas 273 membroj.

Prelegturneo de alilandanoj per la federacio (respondeculo: Josette Ducloyer): turneis la Ruso Aleksandro Melnikov de la 24a de februaro ĝis la 24a de marto 2016 en 12 lokaj grupoj (Montfort, Rennes, Saint-Malo, Saint-Brieuc, Plouézec, Lannion, Douarnenez, Hennebont, Vannes, Herbignac, Nantes kaj Saint-Aignan-de-Grand-Lieu); 9 prelegoj; renkontiĝoj kun bazlerneĵanoj, mezlerneĵanoj, infanoj en kulturdomo (MJC).

Akcepto de preleganto (pere de la turneoj de Espéranto-France - vd. paragrafo 1.1): turneis la Pakistanano Saeed Ahmad.

Ekspozicio pri Esperanto dum la Unua Mondmilito: tri ekzempleroj realigitaj de Josette Ducloyer; en junio 2016, unua ekzemplero prezentita en du liceoj en Saint-Brieuc (sekvita de prezentadoj de la lingvo Esperanto); dua ekzemplero pruntita al la klubo de Arras, prezentita en la universitata biblioteko de Arras (3a-15a de oktobro 2016); tria ekzemplero pruntita al la klubo de Saint-Aignan-de-Grand-Lieu (por la lernantoj kaj por publika prezento); senpage

elŝutebla de aliaj asocioj; jam prezentita en Francio kaj alilande.

Helpe al klerigado: financa apogo al la membroj trapasintaj la KER-ekzamenojn pri Esperanto.

2. Ĉefa agadoj de la aliĝintaj asocioj

Novaj kursoj en 2016 en Douarnenez (29), Pleudaniel (22) kaj Pluvigner (56), kaj ĉe la Universitato de Lorient (56).

Côtes-d'Armor

Asocio Armor-Espéranto

Printempa staĝo, la 30an de aprilo-1an de majo (ĉ. 40 partoprenantoj);

KER-ekzamenoj (B1-B2-C1), la 4an de junio (7 partoprenantoj);

Aŭtuna staĝo, la 19an-20an de novembro (50 partoprenantoj).

Lannion

Konversaciaj renkontiĝoj, merkrede ĉe la "Maison de la Solidarité";

Partopreno en la Zamenhof-festo en Vannes, la 24an de januaro 2016: "Esperantistoj nekredible talentumas";

Kurso la 29an-30an de aprilo 2016 dum Esperanto-staĝo en Saint-Brieuc;

Festeto por la datreveno de Gaby (96 jaraĝa), plejaĝulo de la federacio, en Lannion, la 25an de majo 2016;

Partopreno en la organizado de la KER-ekzameno de Esperanto dum tutmonda sesio, la 4a de junio 2016;

Forumo de la asocioj en Lannion, la 3an de septembro 2016;

Budo ĉe la firo "Bio-zone", en Mur-de-Bretagne, la 10an de septembro 2016;

En la liceo Le Dantec: forumo por akceptadi la lernejanon de "2nde"; Esperanto-budo kun Anne Désormeaux, le 29an de septembro 2016;

Kurso en altlernejo pri telekomunikado ENSSAT.

Guingamp

6 membroj en 2015-2016 kaj 2016-2017;

Renkontiĝo, jaŭde (krom ferioj) - unua duonhoru por komencantoj, ĉe la "Centre d'Activités et de Loisirs" de Roudourou;

2 partoprenantoj en la staĝo de Saint-Brieuc en novembro; alveno de unu komencanto dank' al la staĝo;

Preparo de skeĉo por la Ĝenerala membrokunveno de Armor-Espéranto;

En la bazlernejo de Cavan, kadre de la eksterlernejaj agadoj (TAP): post iniciado fine de 2015, 21 lernejanon volontulis por plulerni Esperanton - unu kunveno ĉiusemajne dum januaro-februaro (2 grupoj) kaj 7 lernejanon plurestis dum marto-aprilo; iniciado al Esperanto (ĉ. 50 min) de ĉiuj lernejanon (CE2, CM1, CM2) laŭ 12-15-homaj grupoj en novembro-decembro.

Pleudaniel

Kurso por 4 novaj lernantoj de septembro 2016; ĉiujajde.

Plouézec

25 aliĝintoj

Trinivela kurso

Internaciaj renkontiĝoj (granda sukceso por la 20a datreveno; ĉ. 150 partoprenintoj)

Finistère

Quimper

Malfondo de la asocio pro la morto de Pierre Le Vern;

Transdono de la instru-dokumentoj al Vannes;

La eksaj klubanoj aliĝas al la federacio kiel memstaraj membroj.

Landerneau

Kurso (2 lernantoj).

Douarnenez

Oktobro 2016: kreado de laborgrupo pri Esperanto en la “Maison Solidaire” de Kermarron; agado fare de la “Réseau d’Échanges Réciproques des Savoirs” de Douarnenez paralele al la plurlingvaj kafejoj (ĉiujauĉaj aranĝoj en lokaj kafejoj); renkontiĝo por babilado, informiĝi, ludi, kanti... por tre rapide aŭtonome apliki la memlernitan lingvon en konkretaj agadoj (vojaĝoj, akceptado...);

Laborgrupoj: ĉiuvendrede (krom dum ferioj); 3 komencantoj; 6 progresantoj;

Novembro 2016: 5 komencantoj partoprenis la staĝon en Saint-Brieuc;

→ La klubo serĉas vortarojn, gramatikajn manlibrojn, romanojn, ktp. por komenci la bibliotekon. Dankon.

Ille-et-Vilaine

Rennes

Kursoj kaj kunvenoj ĉe la asocia sidejo (18 avenue du Doyen Colas - krom alie notite);

Esperanto-kursoj: ĉiumerkrede dum 2015-2016; gvidis Arnaud Malivoir;

Akcepto de prelegantoj (en “Maison Internationale” de Rennes): Saeed Ahmad pri sufismo kaj Pakistano (la 18an de marto, kadre de la turneo de EF; interpretado al la franca; 14 partoprenantoj inkl. 1 ne-esperantoparolanto); Kadígia Constantino pri la historio de Brazilo kun posta gustumado de brazilaj pladoj (la 25an de januaro; 17 partoprenantoj);

Vendredaj vesperoj: ĉiun duan vendredon monate; ĝenerale en kafejo (ofte en “Mod-Koz”); babilado kaj ludoj; 3-8 partoprenantoj;

Ĝenerala membrokunveno: la 16a de januaro 2016.

Foriro de la prezidanto de Rennes (pro profesiaj kialoj) - Pierre Vittet laboras ĉe UEA (2016-2017).

Montfort

Akcepto de prelegantoj: Aleksandro Melnikov (la 24an-26an de februaro) kadre de federacia turneo kun vizito de la urbo kaj de la lago Trémelin; Saeed Ahmad (la 18an-19an de marto) kadre de turneo de EF kun turismo al Montfort, Saint-Malo kaj Mont-Saint-Michel;

Oktobro: kurso al 4 adoleskoj el Montfort (post partopreno en la renkontiĝoj de Plouezek (ĝis la ferioj de Ĉiuj Sanktoj).

Saint Malo

Prelego de A. Melnikov.

14an de julio: Budo dum la “Eŭropa Junulara Parlamento” en la Policlernejo de Saint-Malo.

Kursoj: ĉiumerkrede;

Tradukado de la flugfolioj pri la urbo Saint-Malo kaj la baraĝo ĉe rivero Rance.

Partopreno en la renkontiĝo de Pluezek.

Morbihan

Vannes

Prizorganto: Elisabeth Le Dru

Membroj en 2016/17: 29 (2 pli junaj ol 30; 21 pli maljunaj ol 60).

Publikaj agadoj:

- 15an de marto: publika prelego de Aleksandro Melnikov (20 spektantoj)
- 26an de septembro: publika prelego de François Randin (15 spektantoj)
- François Randin prelegas en 2 klasoj pri filozofio en liceo Lesage en Vannes
- 14an de aŭgusto: 2a prezentado de la teatraĵo “Kulpulo en nia festejo” en Pluezek

Partoprenoj de la asocio en agadoj de aliaj asocioj:

- “Esperantistoj nekredible talentumas”: regiona konkurso (kanto, skeĉo, desegnaĵo, ludo); kun 4 teamoj kaj 1 unuopulo de Vannes, Saint-Brieuc, Herbignac La Baule, Douarnenez, Pontivy kaj Lannion

Lingva Kafejo: ĉiun unuan jaŭdon monate, ĉe kafejo Gambetta; kunsidoj en la angla, la hispana, la germana, la pola, la itala kaj en Esperanto; ĉ. 15-30 partoprenantoj.

Aliaj agadoj:

- Mastrumado de 2 paĝaroj en Fejsbuko (Café des Langues Vannes kaj Espéranto-Vannes)

- Tuta reformiĝo de la retejo “esperantovannes.fr”
- Dono de libroj al Esperanto-Sénégal kaj al laborgrupo Esperanto de Douarnenez

Kursoj (2015-2016): 3 komencantoj; 8 progresantoj; 8 homoj en konversaciroj

Hennebont

Kurso: ĉiumarde, konversacio, tradukado; korespondado kun la germana grupo de Kronarch.

En decembre 2016: 50a jariĝa festo de la klubo.

Akcepto de Svetlana.

Sendado de la aŭtunaj kaj printempaj folioj al niaj korespondantoj (10 landoj).

Raportas Josette Ducloyer

5.4. Burgonjo-Franĉkonteo

Dole-Espéranto

Fundo de la asocio: la 25an de junio 2015

Art. 2 de la statutoj: Dole-Espéranto “a pour but la diffusion, l’étude et l’utilisation de l’espéranto, langue de communication internationale neutre.”

Ĝenerala membrokunveno

La 14an de januaro 2017 post la 2a “Esperanto-sabato”

Prezidanto: Emmanuel Desbrières

Membraro: 12 anoj

Agadoj

- Komence de septembro 2016: Budo ĉe la Foiro de la Asocioj (disdono de centoj da kalendaretoj kaj faldfolioj)
- Aperoj de informoj pri la klubo: sur la lumpaneloj de Dole, en la jarlibro “Sortir à Dole” pri la asocioj de Dole (ĉereta kaj papera versioj), kaj en la retgazeto www.leprogres.fr.
- 22an de oktobro 2016 kaj 14an de januaro 2017: “Esperanto-Sabatoj”; pli ol 30 partoprenantoj
 - prezentado de la libro *La Strigo de Dijono* fare de Magalie Lautrou, Jean-François Droin, Olivier Buisson;
 - formado al Tatoeba de Roland Cuenot el Valentigney;
 - kurso por komencantoj de Emmanuel Desbrières;
 - kukpreparado por infanoj;
 - kantateliero de Annie Griffon el Belfort;
 - prezento de karaokeoj de Lorenzo Tomezoli;
 - prelego pri Kartvelio kaj projekto pri vojaĝo al Kartvelio en 2018 de Régis kaj Tea Fabre;
 - prelego pri la rilatoj inter UEA kaj Bourg-en-Bresse de Michel Fontaine;
 - prezento de lingvistika eksperimento de Christian Guilleminot el Bezansono.
- Komence de julio 2016: Budo en la universitata kampo de Besançon; deĵoris Emmanuel Desbrières kaj Emma Ravot dum 2 tagoj; dum la foiro de la asocioj dum la somera universitato de la asocio ATTAC; kune kun la esperantistoj de Besançon kaj la asocioj de departemento Jura, kun ATTAC-Jura;
- Kafejo “Café-Repaire”, merkredon la 19an de oktobro, ĉe Léonz-Café en Lons-le-Saunier: prezentado de Esperanto (far Emmanuel Desbrières kaj Loïc Audy, 9 partoprenantoj);
- Traduko de *Roule-Galette* kaj sendo al japanaj lernantoj en Japanio (Tomoko Kitani).

Kursoj

2 kursoj de oktobro 2015 ĝis junio 2016: ĉiuvendrede

- je la 12a-14a horo: ĉe la mediateko Albert Camus; instruas Emmanuel Desbrières kaj Alain Droyer; 6 lernantoj;
- je la 19a-21a horo: ĉe kafejo *L’Escale*; instruas Emmanuel Desbrières; 3-4 lernantoj.

Sur le reto

Kluba retejo: <http://jxuraseo.free.fr/> (retejestro: Philippe Gindre)
Paĝaro en Esperanto sur la retejo de *Colibris de Dole*.

Amaskomunikiloj

Artikoloj en lokaj gazetoj: *Hebdo 39, Le Progrès, la Voix du Jura*.

Eksteraj rilatoj

Partopreno de klubanoj (Loïc Audy kaj Michèle Rollet) en “Printempas” en Greziljono;
Vizito de Les kaj Arlyn KERR el Seatlo (je la fino de aprilo 2016): prezentado en liceo de Salins-les-Bains, interparolo kun esperantaj lernantoj, partopreno al anglaj kursoj (la 28an de aprilo); partopreno en la unua esperantlingva vizito de la domo de Louis Pasteur.

Raportis Emmanuel Desbrières

Nacia Esperanto-Muzeo (NEM) de Gray

Retejo: <http://www.naciaesperantomuzeo.fr/>
Fejsbuko: <https://www.facebook.com/naciaesperantomuzeo/>

Kromaj ekspozicioj en la NEM:

- *Esperanto et Croix Rouge 1^{ère} guerre mondiale*: per multajn originalajn dokumentojn kiuj ne estis dum la UK Lille 2015;
- “*Jules Verne et l’espéranto*”: per multajn specialiajn originalajn dokumentojn kiuj ne aperas dum normala vizito.

Raportis Micheline Chateau

5.5. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Ne ekzistas vigla federacia asocio. Tamen pluraj lokaj kluboj aktivas: jen iliaj raportoj.
Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon (vd. paragrafo 2.1.1).

Klubo de Angers (Espéranto-Angers)

Kursoj

Ĉe “Institut Municipal” (gvidis Vito)

Ĉe “La Roseraie” (gvidis Pierre kaj Jeanik)

Esperantistaj gazetoj

La Anĝeva Folio (kluba gazeto): 3 numeroj ĉijare;

Artikoloj en diversaj gazetoj (*La Sago, Sannaciulo*, ktp.) [ekz-e pri veganaj receptoj].

Agadoj

Januaro: novjara kunveno en libana restoracio;

Marto: komitatkunveno de la membroj; ĉ. 40 partoprenantoj; kukoj, trinkaĵoj, spektado de skeĉo preparita dum la konversacia kurso; ŝanĝiĝo de prezidanto kaj sekretario;

Aprilo: partopreno en “Les Renoiriennes”, studenta festivalo pri eksterstudentaj aferoj, por konatigi Esperanton; spektado de la filmo *Esperanto* de Dominique Gautier; babilado; skajpkonversacioj kun alilandanoj;

Julio: budo en foiro “Planète en fête” en Mayenne por konatigi Esperanton;

Septembro: marŝado de klubanoj dum la paca festo; antaŭparolo en Esperanto kun rekta traduko;

Partopreno de tri klubanoj en la Homara Festo en Parizo, ĉe la budo de EF, en la libreja spaco;

Oktobro: spektado de la filmo *Esperanto* de Dominique Gautier, ĉe *Le Bistrot des citoyens du monde*, dependanta de

la popoluniversitato *Albert Jacquard*; kelkaj partoprenantoj;

Decembro: Zamenhof-festo en Malicorne, organizita de la klubo de Maine; vizito de art-fajencejo kaj fajenca muzeo; manĝado en restoracio *L'Ardoise*, kun la spektaklo "Jacques Brel en Esperanto" ludata de FaMo, Pjer' kaj Bernard;

Akcepto de prelegantoj

Saeed Ahmad, el Pakistano (prelego pri sufismo, ktp.);

Abdurahman Junusov, el Dagestano (prelego pri Dagestano, ktp.).

Ĉ. 40 partoprenantoj.

Raportis Pauline Gaborit

Klubo Esperanto-Loiret (45)

Agadoj

Partopreno en asociaj tagoj: "Rentrée en Fête" en Orléans; Foiro de la asocioj en Fleury-les-Aubrais;

Partopreno en la Foiro pri la Homaj Rajtoj: sur la temo "tutmondigo" en 2015-2016;

Prelego de Mireille Grosjean, la 19an de januaro 2016, en aŭlo Marcel-Reggui de la mediateko de Orléans, pri la temo "Superaj lingvoj, internaciaj lingvoj, universalaj lingvoj" (enretigita ĉe la retejo de Esperanto-Loiret: <http://esperanto.loiret.free.fr/index?perma=1253945935>);

Partopreno en Alternatiba ĉe Campo-Santo de Orléans, gvidado de diskuto pri « Pourquoi Jean Zay souhaitait-il le développement de l'espéranto à l'école Et pourquoi ce souhait ne se réalise-t-il pas ? »

Eksterlernejaj agadoj (TAP)

"Eŭropaj lingvoj" gviditaj de Marcelle Provost;

Partopreno de Esperanto-Loiret en Boigny-sur-Bionne en 2014-2015 (sen daŭrigo en 2015-2016);

Partopreno en Fay-aux-Loges dum la printempo 2015 (daŭrigo far Esperanto-Développement-45 ekde septembro 2015).

Esperanto-kursoj:

En Fleury-les-Aubrais (aŭ en rilato kun Fleury-les-Aubrais): 9 regulaj lernantoj ĉijare.

Radioelsendo:

Partopreno de Pierre Dieumegard en kelkaj elsendoj sur la loka radiokanalo RCF de Orléans.

Raportis Axel Rousseau

5.6. Fédération Esperanto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Estraro

Prezidanto: Martine Ragonnet (delegito al la komitato de EF)

Sekretario: Maryse Esclapez

Kasisto: Gilles Perez

Kluboj & anoj

Béziers: 11 (*Pr. Maryse Esclapez*)

Montpellier: 19 (*Pr. Gilles Perez*)

Nîmes: 6 (*Pr. Frederic Bourquin*)

En Lozero estas kelkaj esperantistoj, sed la grupo ne plu funkcias.

(fd: 36 anoj)

Agadoj

En Januaro, disdonado de la kalendaroj al universitatoj en Béziers kaj Montpellier;

Federala kunveno: la 4an de junio en Montferrier; kreado de nova Zeo: nova strato Zamenhof en Montferrier; nova skipo por labori k. ĉefa problemo: helpi la gupojn, kiuj ne plu bone funkcias.

Asociaj forumoj: en septembro en la tri urboj.

Zamenhof-tago kaj printempa kunveno: kune organizas la grupoj de Béziers & Montpellier.

Partopreno en kongresoj

Kongreso de EF en Marseille: 10 homoj.

Itala kongreso: 2 homoj el Lozero.

UK en Nitra: 1 homo el Montpellier.

Kursoj

Béziers: marde k. merkrede

Nîmes: lunde

Montpellier: marde k. ĵaŭde

Akcepto de prelegantoj

En Béziers: Abdurahman Junusov, el Dagestano (prelego pri Dagestano, ktp.).

Bulteno

Sudfrancia stelo (SFS): aperis 2 numeroj en 2016.

Partopreno en *Sennaciulo*, la revuo de SAT.

En Lozero, preparo, relego kaj sendado de la revuo *Esperanto-info* (de Monique, Francis kaj Céline).

Rete

Federacio: <http://esperanto-languedoc-roussillon.fr/la-federacio> kaj martine.ragonnet(à)orange.fr

Béziers: esclapez.laurence(à)orange.fr

Montpellier: <https://www.esperanto-montpellier.org/> kaj gilles(à)octidi.fr

Nîmes: esperantonimes.wordpress.com kaj frederic.bourquin(à)laposte.net

Estontaj planoj

Renkonti la grupon de Tuluzo;

Plu reorganizi la federacion por pli ekike labori;

Helpi la grupojn, esti pli videblaj, por espereble havi pli regulan bultenon SFS.

Raportas Martine Ragonnet

5.7. Association Espéranto-Limousin

Espéranto-Limousin ne estas regiona asocio oficiala membro de Espéranto-France laŭ la interna regularo. Tamen tiu asocio bonvolis sendi sian agadraporton. Ni omaĝas ĝian dinamismon kaj kunlaboremon.

Kursoj

Perreta kurso por 12jaraĝa junulino, fare de Carole Landais.

En Limoĝo (fare de Pjer Tell Bouvier): ekde septembro 2015, 5 novaj sin anoncis sed nur du finfine daŭrigis la kurson ĝis junio, tamen ili ne aŭdacis trapasi ekzamenon, kaj ne realiĝis.

En Saint-Junien (fare de Christian Doucelin): 2 lernantoj.

En Tulle (fare de Clair Mahé): ne plu okazis tiun jaron.

En Brive (fare de Lucia Unia aŭ Gilles Tabard): 7 lernantoj.

En Montboucher (apud Bourganeuf) (fare de Christian Lavarenne): ekde novembro 2015 ĝis junio 2016, 4-5 lernantoj. Tamen la kurso ne plu okazis poste.

Agadoj

Babilkunvenoj (vesperkunmanĝado kaj Esperanta babilado), malfeliĉe plurfoje ili ne okazis en 2016 pro manko da partoprenantoj.

Plua eldono de nia trimonata bulteno: *Babilemo sen Limoj*.

Organizado de "Café des langues" en Brive: ĉiun monaton; ĉiam estas esperanta babilgrupo (inter 5 kaj 12

personoj), preskaŭ ĉiam angla grupo kaj ofte hispana grupo.

Partopreno en agadoj de aliaj organizantoj

Kant-kaj-kursostaĝo (12-13/03), organizita de Isabelle Jacob kun La Kompanoj, en centrejo “La Loutre”; fine ni eĉ kantis 45 min sub la alta volbo de la fama Limoĝa stacidomo.

Kvina organizo de sesio de KER-ekzamenoj (kadre de UEA) en Limoĝo (4/06): 5 kandidatoj.

Renkonto en “La petite fabrique solidaire” en Uzerche kun vizito de la urbo por la diversaj sekcioj de Limoges (87), Bujaleuf (23), Tulle kaj Brive (19); sed du foje preskaŭ neniu venis al antaŭvidita kunveno kaj ni ne realiĝis por 2017.

Partopreno en sciencofestoj en La Porcherie (87).

Du membroj de Esperanto-Limousin partoprenis en la 101a UK en Nitra.

Pjer partoprenis kaj prelegis pri *La Perdita Ŝlosilo* en la kongreso de EF la 5-8ajn de majo en Marseille.

Partopreno en ekologiaj festoj en Brive kaj Tulle kaj “Forum des associations” en Limoĝo kaj Brive.

Partopreno al la Alternatiba festo la 13an de septembro 2015; multaj paneloj en la vilaĝo estis dulingvaj Esperanto-franca; prezentoj de Esperanto per kvar 20-minutaj prelegetoj.

Partopreno en labora semajnfino por plibonigi la kastelon de Grésillon.

Partopreno de Lucia en Interkant’.

Zamenoffesto ĉe Deniz’ kun paperfaldarto proponita de Bernard Guillien kaj kantoj proponita de Pjer; aŭskultado de la registrita voĉo de Zamenhof legante la enkondukon de la Unua Libro.

Ekde septembro, Julien Bécan estis dungita de nia asocio por prezenti Esperanton en mezlernejoj; danke al la vigleco de nia prezidanto, kiu kontaktis multajn lernejestrojn la afero estis bone komencita.

Akcepto de prelegantoj kadre de prelegturneo de EF

Gastigado de Saeed Ahmad: “Sufismo hieraŭ kaj hodiaŭ en Panĝabujo”; 20 spektantoj la 6an de aprilo (kun komuna manĝado); 10 spektantoj la 7an de aprilo.

Gastigado de Abdurahman Junusov: “Dagestano inter Azio kaj Eŭropo”; la 25an de junio en Limoĝo; interpretado al la franca kaj la rusa; la 27an de junio en Brivo, partoprenis ĉ. 20 personoj.

Partopreno en alilokaj agadoj

Vojaĝo en Rumanujo (31/05-11/06) kun Rodica Todor, de Karpatoj ĝis la delto de la rivero Danubo por birdobservado.

Raportas Pierre Bouvier

5.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Regiona kunordigado

Membraro

La Federacio nombras entute 86 membrojn. Arras-Espéranto: 22 Boulogne-Espéranto: 4. Dunkerque-Espéranto: 0 (la klubo decidis ĉesigi sian agadon fine de 2015). Lille-Villeneuve-Espéranto: 23. Somme-Espéranto: 17. Valenciennes-Espéranto: 18. Izoluloj: 2.

Federaciaj kunsidoj, kongresoj

La Federacia Komitato kunsidis dufoje en 2016: la 1an de majo en Araso kaj la 19an de novembro en Stella-Plage. La federacia kongreso okazis la 1an de majo en Araso.

Rilatoj kun UFE

Prezidanto Michel Dechy reprezentas la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo

La Federacio eldonis novan, retan informbultenon *Norda Kuriero* kvarfoje en 2016. Ĝi estis sendita papere al federacianoj, kiuj ne uzas Interreton.

La dulingva federacia retejo viziteblas je la adreso: www.esperanto-nord.org.

Informado en diversaj medioj

Michel Dechy prezentis Esperanton en 2 klasoj (Terminale S) en liceo de Gondecourt en oktobro kaj en tri bazlernejoj kun Dorine Francheteau en Villeneuve-d'Ascq. La diversaj kluboj partoprenis en forumoj de asocioj (Araso, Villeneuve-d'Ascq) kaj en aliaj kulturaj aranĝoj: *Festival de la bande-dessinée* en Lys-lez-Lannoy, *Salon des langues* en Béthune, *Salon du livre* kaj *Arras Solidarité Internationale* en Araso. En Courrière la Arasa klubo havis budon en la festivalo *Melting Potch*, kaj pluraj klubanoj gvidis kursetojn pri Esperanto. Ekspozicio pri Esperanto dum la unua mondmilito estis starigita en la universitata biblioteko de Araso.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj kaj staĝoj

Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernjaro 2015-2016):

- Amieno: 14 gelernantoj: kurso por komencantoj, kurso por progresantoj, grupo kiu preparas libreton pri ĉemara Pikardio, pri pikardaj receptoj.
- Araso: 18 partoprenantoj, sed nur unu komencantino (kurso kaj klubkunveno samtempe okazas);
- Bersée: 8 progresantoj;
- Bulonjo-ĉe-Mar: babilrondo ĉiumerkrede;
- Lillo: 4 komencantoj kaj 3 progresantoj en MRES (Maison régionale de l'environnement et des solidarités), 2 komencantoj en la Universitato pri Libera Tempo;
- Villeneuve-d'Ascq.

Someran staĝon organizis Lille-Villeneuve-Espéranto aŭguste en Villeneuve-d'Ascq kun 2 partoprenantoj.

Dank' al la novaj lernoritmoj (TAP aŭ NAP) Claude Longue-Épée, Michel Dechy kaj Dorine Francheteau gvidis grupojn en Bersée kaj Villeneuve-d'Ascq (entute en 4 bazlernejoj). En Araso Marianne Dunlop same gvidis grupon.

Federaciaj ekzamensesioj

La federacio organizis regionan FEI-ekzamensesion.

Kulturo kaj aranĝoj

Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage

La Federacio organizas ĉiujare Eŭropan Rendevuon. En 2016 la 28a Rendevuo denove okazis en Stella-Plage kun nova skipo estrata de Roch Jullien. La partoprenantoj elektis inter kvar atelieroj: "Eklerni kaj instrui la lingvon" kun Katalin Kováts, "Esperantaj bildrakontoj" kun Michel Dechy, "Esperanta literaturo" kun Anne Jausions kaj "Inico al jogo" kun Arlette Plutniak. Sabate vespere la rendevuanoj aplaŭdis la internacie faman Jomon. La partoprenantoj ankaŭ festis la 15-jariĝon de Edukado.net.

Aliaj aranĝoj

En Araso Roch Jullien dufoje organizis *Dancu tutmonde*, t.e. staĝo pri dancoj el la tuta mondo, kun granda sukceso. Abduraĥman Junusov el Dagestano vizitis Lillon kaj prelegis pri sia lando en la Lilla klubo.

La Valenciana klubo renkontis la klubon de Solre-sur-Sambre en Locquignol. Kvankam la klubo de Solre-sur-Sambre

estis malfondita, 5 eksmembroj partoprenis la kunvenon.

En Lillo estis organizata ĉiumonate ludvespero en la librovendejo V.O.: inter 6 kaj 10 partoprenantoj renkontiĝis kaj babilis pere de paroligaj ludoj (ĉefe *Brin de Jasette*).

Pluraj arasanoj partoprenis la Esperanto-Sumoon organizatan de Hori Jasuo; tiu ludo instigas la partoprenantojn legi librojn en Esperanto.

Pluraj membroj de Lille-Villeneuve-Espéranto partoprenis en la Tago de la Ebena Lando laŭ invito de Piet Glorieux el la Kortrejka klubo (Belgio).

La Lilla klubo organizis sian Zamenhof-feston en la 5a de decembro en MRES (asociara domo): en ĝoja etoso la partoprenantoj kantis, babilis kaj spektis filmeton pri la Universala Kongreso en Nitro.

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj

Pluraj federacioj partoprenis en la Printempa Semajno Internacia kaj en la Novjara Renkontiĝo en Germanio. Kvar federacioj partoprenis la Universalan Kongreson en Nitro.

Raportis ĝenerala sekretariino Katja Boen

5.9. Fédération Espéranto-Normandie (Normandio)

La federacio Espéranto-Normandie ne estas regiona asocio oficiala membro de Espéranto-France laŭ la interna regularo. Tamen tiu asocio bonvolis sendi sian agadraporton. Ni omaĝas ĝian dinamismon kaj kunlaboremon.

Membraro

Membroj: iom pli ol 70 homoj en 2016.

Estraro:

Reprezentantoj de Le Havre (Sylvie Caron, Jean Colombel), Rouen (Matthieu Lecesne), Flers (Anne-Marie Leprévost), Manche (Christian Levesque), Eure (Barthélémy Moraud) kaj Calvados (Gérard Sénécal, Yves Nicolas).

Prezidanto: Yves Nicolas. Kasisto: Jean Colombel. Sekretario: Anne-Marie Leprévost.

Agadoj

Ĝenerala membrokunveno, en Montivilliers (apud Le Havre, 76), en majo: 25 partoprenantoj; tri prelegoj (Alain Chalm, Abduraĥman Junusov kaj Pascal Dubourg). La loka grupo de Flers akceptos la ĝeneralan membrokunvenon en 2017.

Turisma tago en Granville (50), en oktobro: iom pli ol 30 partoprenantoj.

Prelego pri vojaĝo en Irano fare de Yves Nicolas; en Junulhotelo en Coutances (50); ĉeestis nur lokaj esperantistoj.

Ceremonio honore al Harold Mudie (prezidinto de UEA kaj soldato mortigita dum la Unua Mondmilito):

Pierre Lemarchand, Patrice Dufeu kaj Pierre Quillaud (76) reprezentis la regionan movadon dum la granda ceremonio; en Forges-les-Eaux (76); ĉeestis ankaŭ Osmo Buller, nome de UEA.

Kursoj

En Granville (50): kadre de la loka UIA (interĝa universitato); 6-8 homoj; gvidis Christian Levesque;

En Coutances (50): en privata liceo; gvidis Philippe Bony;

En Flers (61): gvidis Anne-Marie Leprévost;

En Le Havre (76): gvidis Sylvie Caron;

En Rouen (76): en amika rondo; gvidis Matthieu Lecesne.

Bulteno

Aperigo de tri numeroj, papere kaj rete;

38 artikoloj de 14 esperantistoj (+ frontartikoloj).

Grupo de Hérouville

Membraro: 25 homoj; Prezidanto: Gérard Sénécal.

Ĉiusemajnaj kursoj (komencantoj, progresantoj, konversacio-traduko). Akcepto de du prelegantoj. Partopreno al loka aranĝo pri Eŭropo. Vojaĝo de 8 membroj en Rusio kaj regulaj kontaktoj kun la ĝemela urbo Tiĥvin (Rusio).

Raportis Yves Nicolas

5.10. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

Agadoj

Printempa staĝo

La 22an-24an de aprilo 2016, en Art-sur-Meurthe (apud Nancy), kunorganizita de Esperanto-Nancy-54; kvindekda partoprenantoj el Francio, Germanio kaj Nederlando;

Prelegis pri literaturo István Ertl; paroligis progresantojn Edmond Ludwig; por la unua fojo instruis al komencantoj Catherine Hel;

La profesia gvidistino Catherine Kremer prelegis pri la sekvoj de la Unua Mondmilito okazinta antaŭ 100 jaroj - ŝi rakontis kiel la loĝantoj deziris rememori kaj rememorigi tiujn terurajn kaj tragikajn eventojn;

Kantis vespere Nataŝa, akompanata gitare de sia filo ambaŭ venintaj de Svedio;

Prizorgis la federacian kutiman libroservon Micheline Colnot kaj Jean-Luc Thibias; haveblis la ĵus aperinta esperantlingva versio de la biografio de nia svis/itala samideano Carlo Nicolodi.

Zamenhoffesto

La 10-an de decembro 2016, en La Forge (apud Wintzenheim), organizita de Michel Basso kaj Edmond Ludwig; partoprenantoj de 24 samideanoj el Germanio, Svislando kaj EFE;

Matene: vizito de la Muzeo Albert-Schweitzer, en Gunsbach; ege klera gvidisto prezentis kun entuziasmo la vivon de la fama teologo, filozofo, orgenisto, ĝangala doktoro - kiu ricevis la Nobel-premion pri paco en 1953;

Distra posttagmezo kaj komuna manĝo.

Partoprenoj de membroj de EFE en eksteraj eventoj

En la UK, en Nitra (Slovakio);

En la "Amika tago", en junio: turismadon per telfero al Nigra Arbaro proponis la Frajburgo grupo;

En la german-franca ekskurso, en septembro: pluraj federacianoj kaj germanaj samideanoj vizitis la surrejnajn akvoelektrejon de Iffezheim kun klarigoj en Esperanto;

En la nun tradicia "aŭtuna staĝo", en Rastatt (Germanio), en novembro: organizita de Badenvirtemberga Esperantoligo (BAVELO); prelegis Lu Wunsch-Rolshoven kaj Bruno Flochon pri informado/reklamado, Ramon Perera kaj Alois Eder pri la Hispana Prihereda Milito kaj la packontrakto de Rastatt, Manfred Westermayer pri helpo al Tanzanio per Esperanto; okazis diversaj kursoj kaj ekskursoj; deĵoris ankaŭ la libroservistoj de EFE.

Federacia bulteno

"La Informilo": prizorgata de André Grossmann; kvar numeroj jare; kolora, papera kaj reta apero; raportoj de membroj ĉeestintaj Esperanto-aranĝojn.

Retejo

<http://esperanto.france.est.free.fr/>

Fotoj de pasintaj eventoj;

Elŝuteblaj aliĝiloj por niaj venontaj staĝoj;

Katalogo de la libroservo de EFE.

Raportas Edmond Ludwig

Agado de la lokaj grupoj

Grupo de Gérardmer

Regulaj monataj kunvenoj de la grupo (7 membroj): legado de tekstoj, ricevitaj leteroj, tradukoj, kreado de tekstoj;

Partoprenoj: en la staĝo en Art-sur-Meurthe en aprilo; en la amika tago en Germanio en junio; en UK de Nitra; en la Festivalo pri Geografio (kuniĝis 4 esperantistoj de diversaj urboj) en oktobro; en la germana staĝo de Rastatt; Decembro: projekciado al la publiko de la fotoj de la UK de Nitra; traduko de tekstoj far la responsulino de la grupo.

TAKE (Tutmonda Asocio de la Konstruistoj Esperantistaj)

Pluapero de la jara revuo nomita nun *Konstruado-kajero*. Raportoj pri konstruado de 7 aŭtoroj.

Preparo de la aperigo de la revuo dum IFEF-kongreso en Colmar en 2017 pri kontraŭaĵoj ligitaj al la temoj de fervojoj.

Asocio Mulhouse-Esperanto

Semanaj kursoj por 3 progresantoj, 1 komencanto.

Monataj kunvenoj de la *Verda Fadeno* (amikaj interparoladoj) (14 personoj enskribitaj).

Tradicia kunveno de la Trireĝa Festo en januaro.

Partopreno en la Mediteranea Esperanto-Semajno en marto.

Membro vizitis esperantistan amikon en Irano, dum aprilo.

Tradicia Jarfina renkontiĝo en restoracio en junio (11 personoj).

Partopreno en printempa staĝo en Art-sur-Meurthe kaj aŭtuna staĝo en Germanio, en *Amika Tago* en Frajburgo (DE), en la UK de Nitra, en renkontiĝo de EFE-Bavelo en septembro. Informbudo dum *Ekologia Foiro* en alzaca vilaĝo Ungersheim en novembro.

Organizado de la Triregiona Zamenhof-festo en Wintzenheim.

Partopreno en Esperanto-Semajno en Katalunio, en oktobro.

La loka revuo SRK aperis 4 foje.

Apero sur la reto <http://mulhouse.esperanto.free.fr/>.

Asocio Esperanto-Nancy-54

Elementa kurso al 4 personoj.

Partopreno en loka festivalo en aprilo.

Organizado de la printempa staĝo de EFE en Art-sur-Meurthe en aprilo.

Informbudo en majo en Nancio dum *Tago de Eŭropo*.

Informbudo en aŭgusto en la *Vilaĝo de la Libro* en Fontenoy-la-Joute.

En junio, septembro kaj oktobro partopreno en lokaj festoj.

Traduko en la francan kaj eldono de la infan-libreto kreita de asocia membro.

Partopreno en staĝoj.

Apero sur la reto.

Asocio Esperanto-Strasbourg

Kursoj por 4 komencantoj kaj 6 progresantoj.

Monataj kunvenoj por preparado de diversaj renkontiĝoj.

Partopreno en la nacia kongreso en Marseille.

Akcepto kaj gastigado de dagestana prelegisto Junusov.

Tradicia pikniko de la asocio en julio.

Informbudo dum la evento "Rentrée des Associations" en septembro.

Raportas Roberto Kueny, sekretario de EFE.

5.11. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)

1. Administrado

1.1 Membraro

	2015	2016	2017
Membroj de la federacio	161	140	
Nombro de lokaj asocioj kaj kluboj *	7	7	
Partoprenantoj en staĝo	3	??	
Partoprenantoj en la unuanivelaj kursoj	5	8	3
Partoprenantoj en la duanivelaj kursoj	8	5	??

* (Asnières-sur-Seine (92)), Boissy-sous-Saint-Yon (91), Bondy (93), Épinay (93), Esperanto-94, GAE 95, Espéranto-Val-de-Seine (77) kaj ILO Châteaufort (78).

1.2. Jarkunveno

La Jarkunveno 2016 okazis la 2-an de Aprilo en la sidejo. La agadan kaj finanĉan raportojn aprobis la partoprenantoj. Poste ili elektis la novan komitaton:

Michèle Abada-Simon, Yann Chiffaudel, Jean Delhomme, Leticia Doormann, William Dumoulin, Didier Janot, ALeks Kadar, Sylviane Lafargue, Didier Loison, Jean-Lucien Mazeau, Daniel Micheneau, Abdel Nouri, Marianne Pierquin, Armelle Piolat. Ĉiuj mandatoj finiĝos en la Jarkunveno 2017.

Kelkaj partoprenantoj kune tagmanĝis en restoracio.

Posttagmeze, la komitatanoj kunsidis por elekti la estraron: Prezidanto: William Dumoulin; Vicprezidanto: Marianne Pierquin ; Kasisto: Didier Loison; Sekretario: Armelle Piolat, Vicsekretario: ALeks Kadar; Rilatoj kun Espéranto-France: Michèle Abada-Simon.

1.3. Komitataj Kunvenoj

Ili okazas trimestre en la sidejo en februaro/marto (antaŭ la Jarkunveno), junio, septembro kaj decembro. Kaj unu plia okazas tuj post la Jarkunveno, por ke la komitato elektu la novan estraron. En 2016 la Komitato fizike kunvenis 5 fojojn: [februare](#), aprile tuj post la Jarkunveno, [junie](#), [aŭguste](#) kaj [decembre](#).

1.4. Rilatoj kun Espéranto-France

Michèle Abada-Simon estas nia delegito ĉe la komitato de Espéranto-France (EF).

Diversaj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe *la Cerisaie* pri diversaj taskoj.

Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de EF kaj partoprenas en la vivo de tiu Landa Asocio.

1.5. Interna Komunikado

La komunikado interne de la Federacio Esperanto Parizo-Francilio disvolviĝas grandparte per la retlisto Francilio (dum 2016, 225 mesaĝoj; 269 en 2015) kaj la retejo <http://esperanto.paris>. De la pasinta jaro ankaŭ per Facebook <http://facebook.com/esperanto.paris> kaj Twitter http://twitter.com/esperanto_paris.

Nune, la komitato pripensas pri rimedo(j) por informi la senretajn homojn.

La komitato komunikas inter si per specifa retlisto, en kiu sendiĝis 136 mesaĝoj dum la jaro 2016; 107 en 2015.

2. Agadoj

2.1. Budoj kaj festoj

En septembro, en multaj urboj okazas *Forumo de asocioj*. Kiel kutime, kelkaj esperantistoj prizorgis en sia urbo. La federacio zorgis pri la *Forumo de asocioj* de Parizo 4a distrikto.

Plurajn aliajn budojn prizorgis aktivuloj de nia Federacio, ekzemple:

- 21 et 22 de majo 2016: Festival de l'Europe, Bois-le-Roi, <http://esperanto.paris/festival-Europe-2016>
- fine de majo: *Salon des Jeux Mathématiques* (75) <http://www.cijm.org>
- la 04an de junio 2016: Alternatiba Montreuil (93)
- 3 kaj 4an de septembro: Salon du Livre et de l'Art en L'Hay-les-Roses (94)
- 3 kaj 4an de septembro 2016 : Fête des Citoyens en Choisy-le-Roi (94)
- 9-11an de septembro 2016: Homara Festo en La Courneuve (93), budo en la Vilaĝo de Libro
- Sab. 245-a - Dim. 25-an/09: Malfermaj Pordoj de nia Federacio, okaze de la Eŭropa Tago de lingvoj (75),
- Sab. 10an de decembro: ZamFesto de la fervojistoj, kun financa kontribuo de la Federacio. Kantis Jacques Le Puil kaj la "chorale de Lutèce"

La ĉefa projekto de la asocio estis la organizado de la Landa kaj Regiona kongreso 2017 de Esperanto en Mandres-les-Roses (en la departemento 94).

3. Instruado

3.1.1 Kursoj (2015/2016)

- Komencantoj: 1 kurso de Michèle Abada-Simon,
- Progresantoj: 2 kursoj, unu de Didier Janot kaj unu de William Dumoulin,
- Trejnesio por la KER ekzamenoj (B1-B2-C1) gvidita de Didier Janot.

3.1.2 Kursoj (2016/2017)

- Komencantoj: 1 kurso de Michèle Abada-Simon,
- Progresantoj: 1 kurso de Didier Janot,
- Trejnesio por la KER ekzamenoj (B1-B2-C1) gvidita de Didier Janot.

3.2.1 Babilrondoj (2015/2016)

- Por progresantoj, organizata de Didier Janot,
- Kulturaj Parolrondoj, 2 lundojn monate, ekde februaro 2016, organizata de Marianne Pierquin kaj Régis Fournier.

3.2.2 Babilrondoj (2016/2017)

- Por progresantoj, organizata de Didier Janot,
- Kulturaj Parolrondoj, 2 lundojn monate, ekde februaro 2016, organizata de Marianne Pierquin kaj Régis Fournier.

3.3. Staĝoj (2016)

Plurfoje okazis semajnfinaj staĝoj por komencantoj (francilio.org/stage-esperanto), gviditaj de Michèle Abada-Simon.

Raportetas William Dumoulin kaj ALeks Kadar

5.12. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

1. Membraro

Espéranto-Provence havis 94 membrojn je la 31a de decembro 2016.

41 pagis al UFE

el ili: 16 pagis nur al UFE

12 pagis la grupan kotizon (Marseille kaj Gap)

4 pagis al UFE kaj la Federacio

9 pagis al UFE kaj sia klubo

20 pagis nur al la Federacio

33 pagis nur al sia klubo

2. Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

Deklaritaj asocioj

04 - Manosque - E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque): 10 federaciaj membroj

05 - Gap - Espéranto-Gap: 5 federaciaj membroj

13 - La Roque-d'Anthéron - Espéranto-La Roque

13 - Marseille: 8 federaciaj membroj - ttt-ejo: <http://esperanto.marseille.overblog.com>

13 - Miramas - G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

83 - Fréjus-Saint-Raphaël - Espéranto-Club Saint-Raphaël-Fréjus: 17 federaciaj membroj

83 - Le Beausset - Espéranto-Le Beausset: 11 federaciaj membroj

84 - Avignon - K.E.C.A. (Kultura Esperanto-Centro de Avinjono)

Antenaj grupoj de Espéranto-Provence

13 - La Ciotat; 84 - Carpentras; 84 - Orange

Individuaj membroj

en urboj de la departementoj: 04 - 06 - 13 - 20 - 83

3. Administro

Komitatanoj kaj respondeculoj

- prezidanto: Pierre Oliva
- sekretario: Pascal Vilain
- kasisto: Nicole Lafitte
- helpkasisto: Michel Cerisay
- aliaj komitatanoj: Monique Arnaud, Franz Mimmersheim, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez
- gazetespondeculo: Pascal Vilain
- retejrespondeculo: Franz Mimmersheim
- reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: Pascal Vilain

Membrokunveno

Ĝi okazis en Marseille la 8an de majo, okaze de la Eŭromediterranea kongreso (UFE-kongreso).

22 partoprenintoj + 11 senditaj rajtigiloj

Komitatkunsidoj

24an de januaro: Marseille (ĉe Thierry Spanjaard)

8an de majo: Marseille (post la membrokunveno)

16an oktobro: La Ciotat (ĉe Renée Triolle)

4. Instruado

Kursoj

en Fréjus-Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon, Manosque

Staĝoj

5an-12an de marto, Les Issambres (83): Mediteranea Esperanto-Semajno;
19an-20an de novembro, Le Beausset (83): Kultura Semajnfino (kursoj gviditaj de Nicole Lafitte, Mari-Roza Vilain, Renée Triolle, Pascal Vilain).

Ekzamenoj

5an de majo, Marseille (13): FEI-ekzamenoj – 7 kandidatoj por la 1-a grado (5 el Provenco); 1 kandidato por la 2-a grado. Zorgis pri la evento Monique Arnaud; ĵuriis Renée Triolle kaj Patrick Lagrange.

5. Informado – komunikado

Unuan kaj trian sabatojn ĉiumonate, E.K.E.M., Manosque (04): deĵorado en la Domo de la Asocioj (tuttaga);
4an-9an de januaro 4/9, Le Beausset (83): ekspozicio “Art et Espéranto” en Pôle Saint-Exupéry;
17an de aprilo, Marseille (13): radio-elsendo kun T. Spanjaard pri la Eŭromediterranea kongreso;
3an de septembro, Manosque (04): Forumo de la asocioj;
4an de septembro, Fréjus (83): Forumo de la asocioj;
10an de septembro, Le Beausset (83): Forumo de la asocioj;
10an de septembro, La Ciotat (13): Forumo de la asocioj;
11an de septembro, Marseille (13): Forumo de la asocioj.

6. Klubaj eventoj

9an de januaro, Manosque (04): ĝenerala kunsido + reĝkuka festeto;
7an de februaro, Fréjus/Saint-Raphaël (83): reĝkuka festo + membro-kunveno;
5an-8an de majo, Marseille (13): Eŭromediterranea kongreso (vd. ankaŭ en paragrafo *Movadaj eventoj*);
22an de majo, Fréjus/Saint-Raphaël (83): tradicia printempa pikniko (en Taradeau);
junio, Saint-Bonnet-en-Champsaur (05): interveno de Abdurharman Junusov en lernejoj, okaze de prelegturneo;
15an de junio, Marseille (13), kaj 16a de junio, La Ciotat: prelegoj de A. Junusov;
17an de junio, Le Beausset (83): vizito de la urbo kun A. Junusov;
26an de junio, Avignon (84): tradicia pikniko en Pernes-les-Fontaines;
26an de junio, Fréjus/Saint-Raphaël (83): komuna manĝado kaj distra posttagmezo en Les Issambres;
3an de oktobro, La Ciotat, kaj 4a de oktobro, Marseille: prelegoj de Rainer Kurz okaze de prelegturneo en Francio;
11an de decembro, Avignon (84): Zamenhof-tago kun prelego de Hannes Larsson pri “Valsoj” + teatra spektaklo;
12an de decembro, Fréjus/Saint-Raphaël (83): Zamenhof-tago.

7. Movadaj eventoj

Februaro, Rusio: partopreno de Renée Triolle en APERO (AntaŭPrintempa Esperanto-Renkontiĝo)
5an-8an de majo, Marseille: Kongreso de Espéranto-France, “Eŭromediterranea Esperanto-Kongreso”, organizita de EF, Espéranto-Provence kaj Espéranto-Marseille;
23an-30an de julio: 101-a Universala Kongreso de UEA en Nitra (Slovakio); partoprenis kelkaj membroj.

8. Kulturaj eventoj

8an de marto, Manosque (04): partopreno de EKEM en la Internacia Tago pri Virinaj Rajtoj;
18an de marto, Puy-Sainte-Réparate (13): ekspozicio kaj prelego pri Victor Lebrun; partoprenis federacianoj;
25an de junio, festo en Sainte-Tulle: partopreno de EKEM;
26an de junio, Gap (05): “Fête de la Paix”;
1an-3an de julio, Manosque: partopreno de EKEM en festivalo “A propos du Japon”
aŭg. kaj sept., Notre-Dame de la Salette (05): prezentado de Esperanto al trideko da junuloj far Monika Arnaud;

10an-11an de septembro, Embrun (05): “Foire Bio Génépi”

21an-25an de septembro, Manosque (04): “Correspondances de Manosque”; partopreno de EKEM;

27an de septembro, Aix-en-Provence (13): “Journée Européenne des Langues”; partopreno de federaciaĵoj;

17an-28an de novembro, Manosque (04): “Semaine de la Solidarité”; partopreno de EKEM.

9. Diversaĵoj

Artikolo de Marc Gallardo, en la februara *Kontakto* (pri Svetlana Aleksejeviĉ, Nobel-premiito);

Artikolo de Renée Triolle en la februara *Monato* (intervjuo de la verkisto Andrej Kurkov);

Tekstoj de Renée Triolle, Marcel Bourrelly kaj Sylvaine Lemagadure en omaĝa libro pri Tolstoj;

Kontribuaĵo de Nina Korĵenevskaja en ruslingva eldono de *Le mot et l'idée*;

Denova partopreno de Anita Collomb kaj Pascal Vilain en la poezia konkurso: “Poezio el ĉiuj ĉieloj”; poemo de Pascal aperis en la tria antologio de la konkurso;

Partopreno de Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva en la ĝenerala kunveno de *Espéranto-Info*, en julio.

10. Venontaj okazaĵoj

Novembro 2017, Le Beausset (83): datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj.

Raportas Pascal Vilain

5.13. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes (Puatuo-Ĉarentoj)

La federacio estas dormanta.

Tamen gravajn eventojn okazigas en Puatuo-Ĉarentoj la kulturcentro pri esperanto Kvinpetalo en Bouresse (86) (vd. ĉisupre la paragrafon 2.1.2 Kvinpetalo).

5.14. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpoj)

Agadraporto por la jaro 2016.

Klubo

Estas deko da kluboj en Rodanalpoj, iuj tre viglaj, aliaj dormantaj.

Klubo	Departemento	Prezidanto	Membraro
Albertville	Savoie		6
Bourg-en-Bresse	Ain	Michel Fontaine	21
Chambéry kaj Aix-les-Bains	Savoie		3 kaj 5
Esperanto 38	Isère	Martine Freydier	22
Grenoble	Isère	<i>Plurala administro</i>	5
Lyon (CERL)	Rhône	Michael Leibman	52
Romans	Drôme	Hannes Larsson	20
Saint-Etienne	Loire	Dominique Sabatier	16

Tarentaise	Savoie		10
Valence	Drôme	Etiennette	3

Aix-les-Bains

Ankoraŭ ne estas klubo sed nova grupo de kvin homoj kuniĝas por lerni Esperanton. Vivu tiu grupo!

Bourg-en-Bresse

Kreskiĝo de la membraro dank' al ligoj de la membroj kun lokaj asocioj pri ekologio kaj solidareco kun la tutmondo.

Eventoj

Liberaĵoj en Attignat, *Printemps des poètes* en Bourg, foiro de Bourg

Ekster la loka zono: en Dijon, Dole kaj Lyon.

Partopreno en staĝoj: KoToPo, Kvinpetalo, Drom.

Inaŭguro de la strato Aimé Cotton en la vilaĝo Dhuys.

Kursoj

Grupaj aŭ unuopaj.

Partopreno en la kromaktivaĵoj (TAP/NAP) ĉe bazlernejoj (Drom).

Internaciaj rilatoj

Koncerto pri Brassens por Nepalo.

Daŭra rilato kun Seulo (ekde 5 jaroj); gastigado de korea amikino.

Komunikiloj

Regula elsendo ĉe lokaj radioj.

Aktiva blogo.

Chambéry

Dormanta klubo post vigla periodo; iu plu restas en la Asocidomo por ne perdi la rezervitan hortempon (dankon al la apogantoj de najbaraj kluboj).

Budo en la *Marché des Continents*, en la asocia foiro kaj en la tago por civita transiro (*Transition Citoyenne*).

Partopreno de la tri membroj en la Zamenhofa Festo de Torino (ĝemela klubo), en la itala kongreso kaj en staĝo en Kvinpetalo.

Esperanto 38

Eventoj

Ĉiusemajna babilrondo.

Ludada tago kun manĝado.

Prezentado de la interciaj kongresoj (baltaj landoj, UK en Nitro, Romo).

Partopreno: en la asociaj foiroj en Fontaine kaj Saint-Martin-d'Hères; en la universitata *Campus en Fête*; en la festo *Fête des Couleurs*; en la pacmarŝado de la Moviĝo por la Paco en la departemento Isère; en brokanto.

Akceptado de Rainer Kurt (kadre de prelegturneo) por publika prelego "Iniciato por la rifuĝinto en Germanujo: platformo por dungado" (artikolo en gazeto, ĉeesto de loka elektito pri kulturo).

Interveno per ludoj en mezlernejo kaj bazlernejoj (kadre de kromaktivaĵoj TAP).

Kursoj

En Fontaine kaj Saint-Martin-d'Hères.

Grenoble

Partopreno de membroj ankaŭ al la eksteraj aktivaĵoj de Esperanto 38.

Bonetosa renkontiĝo kun Esperanto 38.
Ĉiumonata babilrondo.
Partopreno en kongresoj (balta, katala, andaluza, itala).
Tradukado de turista broŝuro al Esperanto.
Neniu kurso (bedaŭrinde).

Lyon (CERL)

Lokaj rilatoj en la liona regiono kun la esperantistaj fervojistoj kaj la KoToPo.
Kreskiĝo de la membraro.

Eventoj

Organizado de staĝoj: en KoToPo (kun gastigado de ne-lionaj esperantistoj), en Argentières kaj en Métabief.
Gastigado de la hungaro Metro Murani, de Radojavi Petrovic kaj de la ĵurnalisto A. Junusov por prelego pri Dagestano.
Partopreno: en civitaj renkontiĝoj en mezlernejo, en *Dialogues en Humanités* (Homaraj Dialogoj).
Budo en foiro pri lingvoj, en asocia foiro kaj en foiro *Salon Primevère* (17 deĵorantaj membroj ĉe bona loko).
Esperanto-festo en KoToPo.

Kursoj

Pluraj kursoj por komencantoj kaj progresantoj.
Diskut-kursoj kaj kulturaj kunvenoj.

Romans – Bona Stelo

Parta reorganizado de la klubo.

Eventoj

Ŝanĝiĝo de la kluba prezidanto de Gaston Risto (post 25 jaroj) al Hannes Larsson.
Babilado: translokiĝo al la kafejo *Le Central* por pli ampleksa videbleco; organizado por alterna okazado en la kulturdomo (MJC) en 2017; plua vigleco malgraŭ maljuniĝo de la partoprenantoj.
Ĉiumonata kuniĝo en la sidejo: kuna manĝado; interŝanĝo inter la membroj pri la partoprenitaj kongresoj (en Marsejlo, en Romo), pri siaj vojaĝoj (al Tajlando, al Ĉinujo, al Rusujo) kaj pri la staĝo (Les Issambres, Greziljono); ludoj; informoj pri la rodanalpa federacio kaj pri Espéranto-France.
Interkluba kunsido en junio.
Partopreno en la asocia foiro kaj en staĝo pri aikido.

Kursoj

Ĉeso por la komencantoj pro manko da lernantoj.
Ĉeso de la kursoj pri traduko de Gaston Riste (post 70 jaroj de Esperanto-instruado – gratulon!).

Saint-Etienne

Eventoj

Kunlaboro kun junuloj de civita servo [*service civique*] (asocioj, i.a. *Uni-Cités*, *Ligue de l'Enseignement*, FACE).
Partopreno ĉiujara en festivalo *Curieux Voyageurs*, kaj en foiro *Tatou Juste*.
Kontaktiĝo kun la gepatroj de lernantoj en liceo kaj instruisto de la eksa IUFM.
Daŭra kontakto kun: asocio ALILOSE (liberaj programoj), asocio *Au Pied des Marches*, legado-kafejo *Remue-Méninges*, lokaj radioj, loka gazeto, *Université pour Tous* (libertempa universitato), studentoj kaj sindikatoj.
Membroj de la klubo partoprenis en staĝo en Lyon.

Kursoj

Tri diversnivelaĵoj kursoj - inkluzive al foraj esperantistoj.

Internaciaj rilatoj

Kun Japanujo, Kroatio, Aŭstrujo, kadre de profesia revuo *Konstruado*.

Kun Kongo pere de la asocio *Solidareco Bona Volo*, el Goma, aparte kun iu familio; alsendado de kuraciloj.

Tarentaise (Tarenteza Esperanto)

Du loke apartaj grupoj en la asocio.

Eventoj

Babilado-manĝado ĉe la membroj.

Partopreno en kromaktivaĵoj (TAP) ĉe bazlernejoj.

Partopreno de la membroj en pluraj renkontiĝoj landaj (Pluezek, Les Issambres, kongreso en Marsejlo), internaciaj (UK en Nitro, festo en Torino, itala kongreso en Romo [kune kun Albertville kaj Chambéry]).

Valence

Kurso

Ĉe la klubo, por unu lernanto.

Kurso en mezlernejo (por la dua jaro).

Raportas Mireille Besset

5.15. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)

La oficiala jarraporto de la sudpirenea federacio legeblas rete jene:

http://esperanto-midipyrenees.org/download/download.php?val=233_rapport+activites+ekc+2015-2016+bilan+ag

1. Ĝenerala kunordigado

Membraro: 109 (lastan jaron: 121)

Lokaj kluboj: CEEA (15 anoj), EKC (68 anoj), Espéranto-Tarn (18 anoj) kaj 8 unuopaj membroj de EF.

Komitatkunsidoj: 3 jare en Arrout.

Jarkunsido: en Tuluzo la 13a de decembro 2016, ĉeestis 10 homoj el 5 departementoj.

Plua asocio aniĝis: Eurokka.

2. Komunikado kaj informado

Bulteno: *La Circulaire de Midi-Pyrénées*, sendita unufoje, en januaro, al ĉiuj membroj rete (aŭ papere por senretuloj).

Retejo ene de <http://esperanto-midipyrenees.org> (kune kun paĝoj por ĉiu departemento kaj ĉiu loka asocio, kaj blogo); respondecas Marion Quenut.

Budoj: multnombraj en Tuluzo, Lavour, Graulhet, plurloke en Ariège.

Radioelsendaĵoj: regulaj elsendoj en Tuluzo, helpe de du volontuloj de Service civique, ĉe *Canal-Sud* 92.2 (<http://canalsud.net>); rethaveblaj ĉe la reteja portalo de Espéranto-Midi-Pyrénées.

3. Instruado

Kursoj regule okazas en la lokaj grupoj: Lavour, Graulhet, Rodez, Montauban, Tuluzo, Verniolle, Mirepoix, Laroque d'Olmes, Foix, Montgaillard.

Tri kursaj semajnfinoj aranĝitaj de EKC okazis en Arrout (15-23 partoprenantoj).

Porinfanaj kursoj en distrejoj de "Francas" en departemento Tarn-et-Garonne fare de esperantisto.

En Lavelanet (Ariège): ekzpozicio kaj prezentado de Esperanto; fundo de klubo en mezlernejo (René kaj Nathalie, en Collège Victor-Hugo).

4. Kulturaj kaj diversaj agadoj

Tradicia Esperanto-festo en decembro en Tuluzo: ĉ. 50 regionaj partoprenantoj, 4 Katalunoj, kelkaj ne-esperantistoj por laborgrupoj, vizitoj, ludoj, manĝoj, spektaklo, filmo, asocia foiro kaj libro-disko-servo.

Korusa staĝo: dutaga, en decembro, en Aygues-Vives (Ariège).

Kadre de la prelegturneo de EF: alveno de Saeed Ahmad en marto kaj de Ahman Junusov en junio.

3a Nomad-kurso: organizita de la Compagnie du Soleil (Ariège), en januaro, en Madagaskaro.

Personaj vojaĝoj kaj partoprenoj en internaciaj renkontiĝoj.

Renkontiĝoj ĉe "Café des langues" en Esperanto: regulaj en Tuluzo kaj Foix.

Manĝo-klaĉoj kaj babil-manĝoj: regulaj en Tuluzo kaj en Ariège.

Lasta debato

Rilate la novan regionon "Okcitanio": ĉu kunfandi la du regionajn federaciojn?

Renkontoj okazos inter la federacioj Sudo-Pireneoj kaj Langvedoko-Rusiljono por trovi vojon akcepteblan de ĉiuj.

Raportas Jeanne-Marie Cash kaj Véronique Bichon

6. Jarraportoj de la fakaj asocioj

6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Nova estraro

Fine de decembro 2016 elektiĝis nova estraro. Ĝi konsistas el:

- Kévin Morel-Fourrier: prezidanto kaj reprezentanto ĉe UFE
- Pierre Vittet: sekretario
- Yann Chiffaudel: kasisto
- Alexandre Raymond: vickasisto
- Lucas Teyssier: TEJO-komitatano A

Aldone, Kévin Morel-Fourrier kaj Alexandre Raymond estas organizantoj de FESTO 2017. Ĉiuj estraranoj estas komitatanoj. Estas neniu kroma estrarano.

Informado kaj komunikado

Kunlabore kun EF, JEFO daŭrigis sian sukcesan eldonadon de kalendaretoj. Tiuj kalendaretoj ankaŭ enhavas informojn pri Esperanto kaj unu bildon. Ili estas senpage disdonitaj dum grandaj kunvenoj ekzemple kaj same senpage senditaj al mendantoj. Eblas donaci monon al JEFO pro tiuj kalendaretoj: tio helpas nin daŭrigi tiun gravan iniciaton.

Aranĝoj organizitaj de JEFO

Pro foresteco de la tiama prezidanto, FESTO 2016 ne okazis.

Estas nuntempe planata FESTO 2017 en Kastelo Greziljono.

Kurso ĉe ENS

Danke al Lucas Teyssier, okazas nuntempe kurso de Esperanto ĉe *Ecole Normale Supérieure*.

Pro tio, tutnova aro da junuloj en pariza regiono interesiĝas pri JEFO kaj Esperanto; pluraj eĉ jam partoprenis en eksterlandaj esperantaj aranĝoj.

Tio estas bona aktivigilo por JEFO kaj eĉ por Esperanto ĝenerale en Francilio.

Retpaĝaro kaj dissendolistoj

La malnova retejo de JEFO estis forlasita kaj estas forviŝenda, profite al tutnova retejo kompletiĝanta iom post iom.

Vizitu nin: <http://nova.esperanto-jeunes.org/fr/>

Ankaŭ estis forlasitaj la malnovaj dissendolistoj, profite al iu nura kaj nova ĉe Google Groups.

Pluevoluiĝo de JEFO

JEFO perdis multe da membroj – aktivaj kaj neaktivaj – en la pasintaj jaroj, kaj estis preskaŭ senaktiva dum unu tuta jaro.

Tamen tre bone estas, ke nun alvenas nova aro da membroj, kaj pluraj el ili pretas aktiviĝi, aŭ eĉ jam aktiviĝas.

Ankaŭ estis decidite plilarĝigi la membriĝan aĝaron ĝis 35 jaroj, same kiel jam faris TEJO kaj aliaj junularaj esperantaj landaj asocioj kiel IEJ.

Estas planata, ke JEFO partoprenu per budo al Salon de l'Éducation en novembro 2017, la projekto estas prilaborata kaj evoluos iom post iom.

Fine, nuntempe ekstarigas vesperaj renkontiĝoj organizataj de JEFO por JEFOanoj sabate, oni planas igi ĝin kutima aranĝo.

Ni konscias pri la multaj defioj antaŭ kiuj ni staras, sed ni ankaŭ salutas la novajn membrojn kaj daŭrigos niajn klopodojn, pliakтивigi nian asocion, kaj havas tre bonan esperon pri la futuro.

Raportas Kévin Morel-Fourrier

6.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

Dank' al la laboro de Jérôme Caré, GEE havas retejon kun multaj informoj kaj mapo de la kolegoj, kiuj instruas esperanton en Francio: www.g-e-e.tk atendas vian viziton kaj eventualan kontribuon.

Dank' al la subteno de Esperanto-France, la staĝo por instruistoj de eksterlernejaj agadoj (TAP aŭ NAP) (ebleco instrui Esperanton, unufoje semajne al lavolontuloj, en la bazlernejoj post la lernotago) gvidata de Katalin Kovats en Kvinpetalo en Bouresse de la 24a de oktobro ĝis la 28a de oktobro 2016, estis granda sukceso; 17 homoj partoprenis.

Sufiĉe da kolegoj profitas tiun eblecon por instrui "oficiale" esperanton en bazlernejoj. Aliaj (kiel Aleks André en Chaumont) instruas en liceoj kaj proponas al siaj lernantoj provekzamenojn por ke iom post iom la diversaj agadoj ĉe la Ministrejo pri Nacia Edukado ebligu la elekton de "nia kara lingvo" en la ekzameno *baccalauréat*.

Raportas Michel Dechy

6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de FKEA.

6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

FET helpis en deĵorado en la budo ĉi-jare mendita de Esperanto-France dum la Homara Festo.

Krome, FET subskribis la alvokon de la pacmovado *Mouvement pour la paix* por ĝia ĉiujara manifestacio dum la tria semajno de septembro.

Raportas Flora Markov

